

# SPIRITISMA REVUO

FONDITA DE ALLAN KARDEC EN 1858

OFICIALA ORGANO DE LA INTERNACIA SPIRITISMA KONSILIO KAJ DE LA FRANCA KAJ FRANCLINGVA SPIRITISMA UNUIGO POR LA DISKONIGO DE LA SCIENCAJ KAJ MORALAJ VALOROJ DE LA SPIRITISMA DOKTRINO

*Kiel li komunikigis kun la Spiritoj?*

*Kiu malkaŝis lian mision?*

*Lia renkontiĝo kun Napoleono*

*Kia la rilato inter li kaj Jesuo?*

*Kiel Spiritismo povas helpi vin?*



# Allan Kardec


## La Kodiginto de Spiritismo



Allan  
KARDEC  
1804 - 2004

*Eldono memoriga pri la Ducentjara  
Datreveno de lia Naskiĝo (1804-2004)*

# PENSOJ, KONSILOJ KAJ MAKSIMOJ DE ALLAN KARDEC



■ Ĉia efiko havas ian kaŭzon, ĉia inteligenta efiko havas inteligentan kaŭzon; la potenco de ia kaŭzo estas en rilato kun la grandeco de ties efiko.

■ Oni ekkonas la kvaliton de la Spiritoj laŭ ilia lingvo; tiu de la bonaj kaj vere superaj Spiritoj estas ĉiam nobla, digna, logika, sen kontraŭdiroj; ĉi estas plena de saĝeco, de bonvolemo, de modesteco kaj de la plej pura moralo; ĉi estas konciza kaj ne havas vortojn senutilajn. Ĉe la Spiritoj malsuperaj, malkleraj aŭ fieraj, la malpleneco estas preskaŭ ĉiam kompensata per la abundeco de la vortoj. Ĉiu penso evidente falsa, ĉiu maksimumo kontraŭa al perfekta moralo, ĉiu konsilo ridinda, ĉiu esprimo maldelikata, banala aŭ simple frivola, fine ĉiu signo de malbonvolemo, de aroganteco, de orgojlo estas nediskuteblaj signoj de malsupereco ĉe la Spirito.

■ Pro sia pliboniĝo, la homoj liveros al la spirita mondo nur bonajn spiritojn, kiuj, siavice reenkarniĝante, nur liveros al la enkorpita homaro pli perfektajn individuojn. Tiam la Tero ne plu estos mondo por kulpelpagoj, kaj la homoj ne plu suferos pro la mizeroj rezultantaj el iliaj neperfektaĵoj.

■ Kien ajn miaj verkoj penetras kaj servas kiel gvidilo, tie Spiritismo estas rigardata laŭ sia vera karaktero, tio estas, laŭ karaktero ekskluzive morala.

■ La sola fakto, ke la Spiritoj komunikigas - kion ajn oni pri tio asertas - tiel pruvante la ekziston de ia ĉirkaŭa nevidebla mondo, ja estis ĉefa punkto, ia vastega kampo malfermita al nia esplorado, la plisilo de granda amaso da neklarigitaj fenomenoj.

■ Per Spiritismo la homaro eniros novan periodon, nome tiun de la morala progreso, kiu ja estas ĉia neevitebla sekvo.

■ La aŭtodafeo en Barcelono ne faris la deziratan efikon pro sia reeŝo en Hispanio, kie ĉi potence kontribuis por la disvastiĝo de la spiritismaj ideoj.

■ Se Spiritismo ne povas eviti la homajn malfortaĵojn, kun kiuj ĉi nepre devas kalkuli, ĉi tamen povas haltigi iliajn sekvojn, kaj tio ja estas la plej grava afero.

■ Marŝante kune kun la progreso, Spiritismo neniam estos superita tial ke, se novaj malkovroj elmontras, ke ĉi eraras pri iu punkto, ĉi ĉanĝiĝos ĉe tiu punkto; se riveligos nova veraĵo, ĉi tiun ĉi akceptos.

■ Kiaj ajn estas la mirindaĵoj, farataj de la homa intelekto, tiu ĉi havas, siavice, ian kaŭzon; kaj ju pli grandaj la faroj de tiu intelekto, des pli granda devas esti la primara kaŭzo. Ĉuste tiu superega intelekto estas la primara kaŭzo de ĉiuj aĵoj, kia ajn estas la nomo, kiun la homo donas al ĉi.

■ Oni rekonas la veran spiritiston laŭ ties morala transformiĝo, laŭ la klopodoj, kiujn li faras, por subigi siajn malbonajn inklinojn.

■ Unu el la plej grandaj obstakloj, kiuj povus malhelpi la disvastiĝon de la Doktrino, ja estus la manko de unueco.



## RIVAIL kaj KARDEC


# E


n Majo 1855, Profesoro Hippolyte Léon Denizard Rivail unuafoje æeestis la fenomenojn de la turniøantaj tabloj. Li tuj duonvidis, en la komunikio de la Spiritoj kun la homoj, ian sciencon kun profundaj moralaj sekvoj. Li komprenis, ke en tiuj fenomenoj troviøas la plisilo de la grava problemo pri la pasinteco kaj la estonteco de la homaro, ja ties solvo, kiun li seræadis dum sia tuta vivo.

Li komencis studadi la komunikaøojn kun scienca kriterio, al ili aplikante la eksperimentan metodon kaj serioze demandante la Spiritojn pri tiaj temoj, kiel Dio, la Spiritoj kaj la surtera destino de la homo. Kiam la kolektita materialo konsistigis ian tutalaon kaj gajnis proporciojn de ia doktrino, li publikigis la ricevitaĵajn sciojn cele al la instruado de æiuj personoj. Sed li ne konsciis la amplekson de la plenumata laboro: ja ia Doktrino povanta skui kaj transformi la tutan mondon.

En Aprilo 1856, al li estis donita, de la Spirito Zefiro, la unua revelacio pri lia misio, kiun poste konfirmis la Spirito Hahnemann. La Spirito de Vero, en la 12<sup>a</sup> de Junio 1856, rekonfirmas al li tiun mision kaj klarigas ties signifon. Li ankaý avertas lin, ke la laboro de la reformantoj estas plena de rifo kaj danøeroj, kaj ke al li ne sufiæos publikigi librojn: «Vi devas elmeti vin mem».

Rivail ne konfuziøas æe la proponita defio kaj senhezite akceptas la taskon: «Sinjoro! æar vi bonvolis turni viajn okulojn sur min por la efektivigo de viaj decidoj, plenumiøu via volo! En viaj manoj sidas mia vivo; disponu pri via servanto.» Kun tia sinteno de konvinko kaj fido, la klera edukisto Prof. Rivail malaperas, por cedi lokon al la eminenta figuro de Allan Kardec, kiu konkretigas sur la Tero la Doktrinon de la Konsolanto promesita de Jesuo.

En la nuna jaro 2004, la 3<sup>an</sup> de Oktobro, kiam oni memorfestas la Ducentjaran Datrevenon de Naskiøo de Allan Kardec, la Spiritisma Revuo, de li mem fondita, faras sinceran kaj justan omaøon al la Kodiginto de la Spiritisma Doktrino, kiu starigis la fundamentojn por konstruado de ia nova erao por la rebonigo de la homaro. 



**SPIRITISMA REVUO**  
Eldono em Esperanto  
revista@spiritist.org  
www.spiritist.org/spiritismarevuo

Membroj  
de ISK



Fondita de Allan Kardec en la 1<sup>a</sup> de Januaro 1858  
Oficiala Organo de la Internacia Spiritisma Konsilio  
kaj de la Franca kaj Franclingva Spiritisma Unuiøo

**Adresoj:**  
**Internacia Spiritisma Konsilio**  
Øenerala Sekretariejo  
SGAN - Q. 603 - Conj. F  
70830-030 - Brasilia - Brasil  
spiritist@spiritist.org

**Franca kaj Franclingva Spiritisma Unuiøo**  
1 rue du Docteur Fournier  
Boîte Postale 27 07 – 37027 Tours Cedex 1  
37000 - Tours - France  
union.spirite@wanadoo.fr

**Direktoroj de la Revuo**  
Nestor João Masotti  
Roger Perez

**Redakcia Komitato**  
Prezidanto:  
Roger Perez  
Vicprezidanto:  
Nestor João Masotti

**Membroj:**  
Anita Becquerel, Franck Clavaressa, Florbela Lopez, Bruno Gérard, Fatima Medjahed, Christiane Brageul, Gérard Ollagnier, Bernadette Rougier, Michel Buffet, Patrick Rougier, Altivo Ferreira, Antonio Cesar Perri de Carvalho, Antonio Vasconcelos, Arnaldo Costeira, Fábio R. Villarraga, Jean-Paul Evrard, Juan Antonio Durante, Vanderlei D.C. Marques, Karine Minko, Jérémie Philippe.

**Administra Komitato**  
Prezidanto:  
Nestor João Masotti  
Vicprezidanto:  
Roger Perez

**Membroj:**  
Anita Becquerel, Antonio Cesar Perri de Carvalho, Antonio Vasconcelos, Aparecido Belvedere, Charles Kempf, César Soares dos Reis, Elsa Rossi, Jean-Claude Roche, João Pinto Rabelo, Luiz Carlos Nerosky, Michel Buffet, Patrick Rougier.

## Plenuma Komitato de ISK

Nestor João Masotti (Brazilo) - Øenerala Sekretario  
Roger Perez (Francio) - 1<sup>a</sup> Sekretario  
Vitor Mora Feria (Portugallo) - 2<sup>a</sup> Sekretario  
Vanderlei D. C. Marques (Usono) - 1<sup>a</sup> Kasisto  
Juan A. Durante (Argentina) - 2<sup>a</sup> Kasisto  
Altivo Ferreira (Brazilo)  
Álvaro Vélez Pareja (Kolombio)  
Fabio R. Villarraga (Kolombio)  
Gloria Insfrán (Paragvaĵo)  
Jean-Paul Evrard (Belgio)  
Olof Bergman (Svdio)  
Salvador Martín (Hispanio)

Eldona Konsilio



ELDONO EN ESPERANTO

# SPIRITISMA REVUO

revista@spiritist.org  
www.spiritist.org/revuospiritisma



**INTERNACIA SPIRITISMA KONSILIO**  
Ĝenerala Sekretariejo  
Tel: (55.61) 322-3024 -  
Fakso: (55.61) 321-8760  
SGAN - Q. 603 - Conj. F  
70830-030 - Brasília - Brasil  
spiritist@spiritist.org  
www.spiritist.org

ELDONO EN ESPERANTO

«LA REVUE SPIRITE»

“La Revue Spirite” - fondita de Allan Kardec en la 1<sup>a</sup> de Januaro 1858 - ankaŭ estas eldonita en Esperanto en ĉi monato Oktobro, omaĉe al la Ducentjara Datreveno de Naskiĝo de Allan Kardec.

### Kunlaborintoj kaj Tradukintoj

Afonso Soares  
Rio de Janeiro - Brazilo  
Antonio César Perri de Carvalho  
Brazilja - Brazilo  
Divaldo Pereira Franco  
Salvadoro - Brazilo  
Luis Hu Rivas  
Brazilja - Brazilo  
Sonia Zaghetto  
Brazilja - Brazilo

### La Revue Spirite

Pensoj, konsiloj kaj maksimumoj de Allan Kardec

1 Ĉefartikolo

2 Enhavo

23 Transmonda Mesaĉo

Jesuo kaj Kardec

35 Novaĵoj kaj Internet

4<sup>a</sup> Tutmonda Kongreso de Spiritismo

39 ISK



La Revue Spirite

59/60


www.spiritist.org/larevuespirite

## HISTORIO

E

n 1862, Allan Kardec publikigis en «La Revue Spirite», sub la rubriko «Spiritismaj Disertacioj», mediumajn komunikaĵojn titolitajn «La Duelo», «Fundamentoj de la Socia Ordo», «Rolo de la Pariza Societo», «Pri la Deveno de la Lingvo», krom alia titolita: «Ĉi tie kupas 18 Jarcentoj el Lumoj».

En «Pri la Deveno de la Lingvo» estas jenaj konsideroj de la Spirito aŭtoro: «(...) kvankam mi ne celas doni kurson pri lingvoscienco, tamen ne estas al vi nekonate, ke en la plej

La Revista Espirita - N<sup>o</sup> 4

malproksimaj lingvoj troviĝas vortoj kies radikoj malmulte ŝanĝiĝis kaj kies signifo restis preskaŭ la sama. (...) Tie — *en via Francio tiel fiero pri sia civilizacio!* — vi vidas la konsonancojn, la terminojn kaj la signifodiversecon, mi ne diras de provinco al provinco, sed ja de komunumo al komunumo. (...) Tio estas diverseco de idiomoj kaj dialektoj fortimiganta tiun, kiu volus ilin kolekti en





04

## Kovrilo

*Allan Kardec, la Kodiginto de Spiritismo*  
*Sinjorino Allan Kardec*  
*Komenco de la Spiritisma Esplorado*  
*Spiritismo aperas*  
*Kardec kaj praktikado de karitato*

12

## Memoro

*Mia Misio*

20

## Historio

*Sur la paĝosignoj de Kardec*  
*La komenco de la Historio*

24

## Senkapa Dialogo

*Allan Kardec kaj Spiritismo*

26

## Psikografio

*Kardec kaj Napoleono*

29

## Informo

*Allan Kardec kaj la mil spiritismaj Societoj en la mondo*  
*kun kiuj li korespondadis en 1864...*


unu sola vortaro.» Antaŭ ol konkludi, la aŭtoro asertas:

«Mi povas plie diri al vi, ke la homaro iras sur la vojo al ununura lingvo, kiel nepre sekvo de ia komuneco de ideoj pri moralo, politiko kaj, precipe, religio. Tia estos la verko de la nova filozofio, de Spiritismo, kiun ni hodiaŭ instruas al vi.»<sup>2</sup>

Iam kaj iam «La Revue Spirite», longe post Kardec, pritraktis la kreon de ia universala lingvo, kiel ekzemple la artikolo de P.-G. Leymarie, tre longa kaj citanta æi-koncernajn nomojn kaj penadojn, publikigita en la jaro 1897, p. 709 øis 715.

Kion Erasto antaŭdiris en la tempo de la Kodiginto, tio fariøis feliæa realaøo: *Esperanto!* Æi tiu *helpa* kaj *neytrala* internacia lingvo, kiu ne celas anstataŭi ian ajn lingvon, mortan aŭ vivan, de la homaro, aperis en 1887 dank'al la penadoj kaj

klereco de D-ro Zamenhof, kaj tuj poste la spiritistoj øin apogis kaj disvastigis, tiel agante øis nun.

El la portugallingva verko *Allan Kardec – Biobibliografia Esploro kaj Interpretaj Eseoj*, de Francisco Thiesen kaj Zêus Wantuil, 3<sup>a</sup> Volumo, Apendico, N-ro V. – Eldono de la Brazila Spiritisma Federacio. 

<sup>1</sup> La vortoj inter haltostrekoj apartenas al la komunikaøo, kaj la kursivigo estas nia.

<sup>2</sup> *Erasto*, en mediuma diktaøo al S-ro D

'Ambel, æe la Pariza Societo por Spiritismaj Studoj, publikigita en «La Revue Spirite», Nov.

– 1862, p. 349, sub la titolo «De l'origine du langage».



# Allan Kardec

## La Kodiginto de Spiritismo



omo eksterordinara, de universalisma klereco kaj senripoŝa konduto. Hippolyte-Léon Denizard Rivail - Allan Kardec - markis la jarcenton XIX per prezento de la Doktrino povanta morale rebonigi la homaron: Spiritismo.

Dank'al sia rafinita intelekto, morala grandeco kaj rigora scienca metodo, Kardec povis taksu la kvaliton de miloj da transmondaj komunikaĵoj, ilin adekvate klasi kaj sistemigi. Lia firmeco estis decida, por ke la naskiĝanta Doktrino ne aperu infektita de personaj opinioj, tiel de enkarniĝintoj kiel ankaŭ de elkarniĝintoj, sed ja fariĝu ekzakta interpreto de la leĝoj regantaj la vivon kaj tiel portu la stampon de la universala vero.

En 1804, Lyon estis la dua plej granda urbo de Francio post Parizo. Tie, en la 3<sup>a</sup> de Oktobro, naskiĝis Hippolyte-Léon Denizard Rivail. Liaj gepatroj, Jean-Baptiste Antoine Rivail kaj Jeanne Louise Duhamel, loĝis ĉe la Strato Sale, 76. La domo, en kiu li naskiĝis, estis malkonstruita ankoraŭ en la jarcento XIX.

En 1815, la knabo Rivail iras al loko, kiu havos decidan rolon en lia intelekta edukado: la Edukejo fondita de la fama Johann Heinrich Pestalozzi. Kun sidejo en la Kastelo Zahringer, en la urbo Yverdon, Svisio, la Edukejo funkciis kiel internulejo. La lernantoj ricevis altkvalitan, kompletan edukadon, laŭ la novenkondukita pedagogia metodo de Pestalozzi. Gravajn kaj progresigajn lecionojn Rivail definitive enkapigis al si en tiu tempo.

Sep jarojn poste, Rivail forlasas Yverdonon kiel bakalari pri Lingvoj kaj Sciencoj kaj ekloĝas en Parizo, jam studinte la verkojn de Platono, Aristotelo, Kartezio, Voltero, Spinozo, Kant, Diderot kaj Montesquieu. Rousseau estis la granda inspiranto de lia majstro Pestalozzi. De la fama svisa pedagogo li ankaŭ lernis ami la studadon kaj valorigi la transigon de la sciado.

Eminenta poligloto, li scipovis, inter pluraj lingvoj, la germanan, la anglan, la italan, la hispanan kaj la nederlandan. Dum sia vivo li tradukis germanajn kaj anglajn verkojn en la francan, kaj inverse. El inter la de li tradukitaj francaj klasikaĵoj

**1804** – En la 3<sup>a</sup> de Oktobro Hippolyte-Léon Denizard Rivail naskiĝas en Lyon, Francio. Liaj gepatroj, Jean-Baptiste Antoine Rivail kaj Jeanne Louise Duhamel loĝis ĉe Strato Sale, 76. La domo, en kiu Naskiĝis Rivail, estis malkonstruita ankoraŭ en la mezo de la jarcento XIX.

**1815** – Rivail iras al la urbo Yverdon, Svisio, por lerni en la Edukejo de Johann Heinrich Pestalozzi. En tiu Edukejo, kiu funkciis kiel internulejo, la lernantoj ricevis kompletan edukadon laŭ la pliperfekta pedagogia metodo de Pestalozzi, kiu baziĝis sur lia konvinko, ke amo estas la eterna fundamento de edukado.



Strato Christine, 5.

**1823** – Rivail forlasas Yverdonon kaj ekloĝas en Parizo. En Januaro 1823 li loĝis ĉe Strato de la Harpe, 117. De 1828 ĝis 1831, li loĝis ĉe Strato de Vaugirard, 65.

**1824** – Rivail publikigas sian unuan didaktkan libron, nome *Cours pratique et théorique d'arithmétique*, planita laŭ la metodo de Pestalozzi. Ĝi estis publikigita en Parizo, ĉe la Imprimerie (Presejo) de Pillet Ainé,

**1825** – Rivail fondas sian unuan lernejon, nome École de Premier Degrée.

**1826** – Fondiĝas la Institution Rivail, teknika lernejo, ĉe Strato de Sèvres, 35, kiu funkciis ĝis 1834. En tiu sama loko poste funkciis la Lycée Polymathique, kiu Rivail direktis ĝis 1850, kiam li estis cedita al A. Pilotet. Ekde tiu jaro Rivail ĉesigis siajn instruistajn aktivecojn.

**1828** – Rivail publikigas «*Plan proposé pour l'amélioration de l'éducation publique*», per kiu li proponis gvidliniojn por la publika instruado.

**1831** – Profesoro Rivail publikigas «*Grammaire Française Classique sur un nouveau plan*».

**1832** – Li edziĝas kun Amélie-Gabrielle Boudet (1795-





elstaras verkoj de Fénelon (François de Salignac de la Mothe).

Kvankam la juŝista kariero estis tradicia en lia familio, Rivail tamen sekvis sian alvokiĝon al Scienco kaj Filozofio. Perfekta, talenta edukisto, lia erudicio ampleksis ne nur diversajn branĉojn de la Scienco sed ankaŭ la artojn. Li estis membro de doktaj akademioj kaj posedis diversajn diplomojn. Male al tio, kion asertis lia biografo Henri Sausse, Rivail ne estis kuracisto, kaj tiu eraro fontas



el la fakto, ke li instruadis Komparan Anatomion.

Laŭ fidindaj fontoj, ekzistas almenaŭ 21 tekstoj pri edukado de lia aytoreco, inter didaktikaj libroj kaj diversaj verketoj. De plej frua infaneco li elmontris maloftan pedagogian talent-diversecon, ĉar li ja vigle kaj profundapense moviĝis en tre malsamaj kampoj de la homa scio: de gramatiko ĝis aritmetiko, tra kemio kaj astronomio. En 1824, dudekjaraĝa, li publikigis sian unuan didaktikan libron, *Cours pratique et théorique d'arithmétique* (Praktika kaj Teoria Kurso de Aritmetiko), planitan laŭ la metodo de Pestalozzi kaj eldonitan en Parizo, ĉe la Imprimerie de Pillet Aîné.

Unu jaron poste, li fondis sian unuan lernejon, la *École de Premier Degré*, kiun

postvenos, en 1826, la *Institution Rivail*, ĉe la Rue de Sèvres, 35, kie li instruadis kemion, fizikon, komparan anatomion kaj astronomion. Tiu *Institution* funkciis ĝis 1834. En tiu sama loko poste funkciis la *Lycée Polymatique*, kie li instruadis fiziologion, astronomion, kemion kaj fizikon. La *Lycée* estis direktata de Rivail ĝis 1850, kiam li finis sian instruistan aktivecon.

Kun la aĝo de 24 jaroj, Rivail lanĉas kuraĝan proponon kun gvidlinioj por la publika instruado: «Plan proposé pour l'amélioration de

l'éducation publique». Post tri jaroj li eldonas la *Grammaire Française Classique sur un nouveau plan*.

Tiu rimarkinda intelekta kapableco, al kiu aliĝis potenca kritika juĝado kaj senpartieco, ja karakterizantaj lian kutiman sintenon, estis decida por ke profesoro Rivail elplenumu la taskon de sia vivo, nome la Kodigon de Spiritismo. Por rekte rigardi la Akademion, la superregantan religion, la komunan saĝon kaj siatempajn kaj nuntempajn antaŭjuĝojn, ja necesis decidema karaktero kaj nefantaziema temperamento. En la tuta verkaro de Rivail - tiel en la Spiritisma Kodigo kiel ankaŭ en la dek du jaroj de la Spiritisma Revuo kaj ceteraj skriboj kaj notoj - klare vidiĝas la stampo de lia supera intelekto tute inklina al metodo, ordo, disciplino kaj vortprecizeco. ■

1883), kiu fariĝos al li sindonema kunulino kaj apogo en ĉiuj momentoj ĝis lia elkarniĝo. Amélie-Gabrielle, kiu poste fariĝis pli konata kiel «Sinjorino Allan kardec», estis instruistino kaj kunlaboris kun la edzo en liaj didaktikaj aktivecoj. Ili ne havis filojn.

■ **1848** – Komenco de la spiritismaj fenomenoj ĉe la familio Fox, en Hydesville, Novjorko, Usono. En la 28<sup>a</sup> de Marto okazas la unuaj fizikaj fenomenoj; post tri jaroj ekestis la unua tiptologia komunikado. Post ne multaj jaroj, similaj fenomenoj vekis la publikan atenton ne nur en Usono sed ankaŭ en Eŭropo. Tio estis la fazo de la tiel nomataj «turniĝantaj tabloj».



■ **1854** – Rivail estas informita de S-ro Fortier, magnetizisto kaj lia konato, pri la turniĝantaj tabloj. Malgraŭ sia miro, li tamen ne rigardis ilin neeblaj, ĉar ili ja povus havi ian kaŭzon fizikan, kvankam ankoraŭ nekonatan. Sed ĉe la aserto de S-ro

Fortier, ke la tabloj ankaŭ «parolas», li skeptike reagis. «Mi kredos nur tiam, kiam al mi estos pruvite, ke tablo havas cerbon por pensi, nervojn por senti kaj povas fariĝi somnambulo.»

■ **1855** – S-ro Carlotti faras al li longan raporton pri la strangaj fenomenoj de la turniĝantaj tabloj.

Kvankam Rivail konis lin jam de 25 jaroj, li tamen ankoraŭfoje elmontras rezervon pro la ekzalta temperamento de lia amiko.

■ **1855** – En *Majo*, Kardec iras kune kun Fortier al la domo de S-rino Roger, somnambolino, kie li konatiĝas kun S-ro Pâtier kaj S-rino Plainemaison. S-ro Pâtier parolas al li pri la fenomenoj sed serioze kaj malvarmakore, kio lin antaŭemigas al observado de la faktoj.

■ **1855** – Ankoraŭ en *Majo*, invitive de Pâtier, Rivail ĉeestas kelkajn eksperimentojn ĉe S-rino Plainemaison, ĉe Strato Grange-Batelière, 18. Rivail impresiĝas de la fenomenoj, kiuj okazadis en kondiĉoj «estigantaj nenian dubon.»



# Sinjorino

## Allan Kardec

**E**n la 6<sup>a</sup> de Februaro 1832, profesoro Rivail edziĝas kun Amélie-Gabrielle Boudet (1795-1883). La dolĉa Amélie ankaŭ ricevis rafinitan edukadon. Ĝi estis instruistino pri Lingvoj kaj Belartoj, desegnistino kaj poetino, kaj jam estis verkinta tri librojn: *Printempaj Rakontoj* (1825); *Elementaj Sciigoj pri Desegnado* (1826) kaj *Tio esenca en Belartoj* (1828). La diferenco pri aĝo - ĉi estis naŭ jarojn pli aĝa ol li - neniam estis baro al la feliĉo de la geedzoj. Pruvon pri la delikateco de ilia amo ni trovas en raporto de Léon Denis, enskribita en la Analoj de la Spiritisma Kongreso de 1925, kie li preparolas la tagon, en kiu li konatiĝis kun Allan Kardec.

Laŭ la raporto de Léon Denis, Kardec venis al la urbo Tours, kies tieaj spiritistoj alkuris por saluti lin. Tiam ia severa imperia leĝo malpermesis la kunvenon de pli ol dudek personoj. Ĉe lasthora decido, la urbestro ne donis la permeson, kaj la renkontiĝo kun Kardec estis urĝe translokita al la ĝardenoj de la domo de S-ro Rebondin, nomata Spirito-Villa. Preskaŭ tricent personoj kunpremiĝis sub la arboj, tretante la

bedojn, por aŭskulti la Kodiginton de Spiritismo en tiu memorinda nokto, kiun Léon Denis priskribas kun resopira akcento kaj poezia tono: «Sub la lumo de la steloj, la dolĉa kaj gravatona voĉo de Allan Kardec leviĝis. Lia pripensema vizaĝo, lumata de malgranda lanterno sur tablo en la mezo de la ĝardeno, prenis fantastan aspekton.» En tiu nokto, la Kodiginto parolis pri la obsedo kaj respondis, kun «ridetanta boneco», la al li faritajn demandojn. Malgraŭ ke la bedoj de s-ro Rebondin restis dispremitaj, asertis Denis, ĉiu el la aĝestantoj konservis neforviĝeblan memoron pri tiu nokto.

La sekvintan tagon, Denis revenis al Spirito-Villa por fari viziton al la Majstro. Tie li vidis scenon, kiu elmontris la afablan personecon de Allan Kardec kaj lian amon al Amélie: «Mi trovis lin staranta sur benketo apud granda ĉerizarbo, kaj li deĉiradis fruktojn, kiujn li almetis al S-rino Allan Kardec. Ja bukolika sceno, kontrastanta kun liaj gravaj zorgoj».

Jarojn poste, okaze de la elkarniĝo de Amélie, Pierre Gaëtan Leymarie - unu el la plej elstaraj kontinuantoj de la verko de la liona majstro

☞ **1855** – En unu el tiuj seancoj, li konatiĝas kun la familio Baudin, tiam loĝanta ĉe Strato Rochechouart (ekde 1856 ili ekloĝas ĉe Strato Lamartine). Invitite de S-ro Baudin, li komencis asidue frekventi la semajnajn seancojn, kiuj okazis en lia domo. La medioj estis la filinoj de la paro, nome Caroline kaj Julie, kiuj komence skribis helpe de ia korbeto.

☞ **1856** – Rivail ankaŭ ekfrekventas la spiritismajn seancojn ĉe S-ro Roustan, ĉe Strato Tiquetonne, 14. Kiel medio rolis somnambulino, F-ino Japhet, per kiu la Spiritoj helpis lin fari kompletan revizion de la tekstoj mediume ricevitaj per la mediumeco de la junulinoj Baudin.

☞ **1856** – En la 30<sup>a</sup>

de Aprilo, per la mediumeco de F-ino Japhet, Kardec ricevas la unuan sciigon pri sia misio. Sekvas aliaj kun pli pozitivaj karaktero.

☞ **1857** – Estas finita, en la komenco de ĉi tiu jaro, la manuskripto de «La Libro de la Spiritoj»; la eldonisto E. Dentu sendis ĝin al la Imprimerie de Beau, en Saint-Germain-en-Laye, je 23 km okcidente de Parizo. La elspezojn pagis Rivail, kiu tiam loĝis ĉe la Rue des Martyrs n<sup>o</sup> 8, dua etaĝo, en la fundo de la korto.

☞ **1857** – En la komenco de la jaro, aperas publike la unua eldono de *La Libro de la Spiritoj* (*Le Livre des*



*Esprits*). Por ĉia publikigo Rivail adoptas la pseŭdonimon Allan Kardec.

☞ **1857** – En *Oktobro* de tiu jaro komenciĝis la spiritismaj seancoj ĉe gesinjoroj Allan Kardec, ĉe Strato des Martyrs, 8. Ili okazis ĉiumarde nokte, kaj la ĉefa mediumo

estis F-ino Ermance Dufaux. Pro la kreskanta nombro de la vizitantoj, necesis trovi pli vastan ejon. La trovita solvo estis lumbambo, kaj la elspezo estis dividita inter ĉiuj personoj.

☞ **1858** – En la 1<sup>a</sup> de Januaro Kardec lanĉas la unua numeron de la *Spiritisma Revuo* (*Revue Spirite*), Gazeto de Psikologiaj Studoj, enhavanta raportoj pri fizikaj aŭ inteligentaj manifestiĝoj





- malkapis, kiom ĉi gravis en la strukturado de Spiritismo: «La publikigo, kiel de *La Libro de la Spiritoj*, tiel ankaŭ de la *Revue Spirite*, grandparte ŝuldiĝis al la animfirmeco, insistado kaj persistado de S-rino Allan Kardec». Ankoraŭ laŭ Leymarie, Kardec kutime invitadis ĉe si spiritistajn amikojn por vespermanĝo, kunigante samidealanojn en frataj kunvenoj. En Gaby, Kardec ĉiam havis la kunulinon, kiu lin subtenadis en la malfacilaj tagoj de la naskiĝanta Spiritismo. Ili kune alfrontis la materialajn perdojn, la kalumniojn levigantajn kontraŭ la Kodiginto de la Spiritisma Doktrino, la malfacilaĵojn en la Pariza Spiritisma Societo, la mordantan kritikon, kiu elbordiĝis el la gazetoj. Sed ankaŭ kune ili vidis la Spiritisman Doktrinion naskiĝi, amis la edukadon kaj la artojn, stimulis la bonfaradon kaj la karitaton. Ili ne havis biologiajn filojn sed postlasis milojn da filoj spiritaĵoj, kiuj ilin omaŭas en ĉi jaro 2004, kiam oni memorfestas la 200 jarojn de la reenkarneco de tiu, kiu bone plenumis la mision, porti al la homoj la Konsolanton promesitan de Jesuo. ■




Verkita de Irene Hermanperez Malvezi

de la Spiritoj, pri aperoj, elvokoj, ktp, krom ankaŭ ĉiuj novaĵoj pri Spiritismo. Bureau (Oficejo) ĉe Strato des Martyrs, 8, Parizo.

■ **1858** – En la 1<sup>a</sup> de Aprilo okazas la laŭleĝa fondo de la Pariza Societo por Spiritismaj Studoj, france Societé Parisienne des Études Spiritiques, kies titolon Kardec ofte mallongigis al «Societé Spirite de Paris», «Societé des Études Spiritiques», aŭ eĉ «Societé de Paris». Estis en la ĉiusemajnaj kunsidoj de la Societé, ke okazis plejparto de la mediumaj kaj porstudaj seancoj direktitaj de Allan Kardec.

■ **1859** – Kardec lanĉas la libron *Kio estas Spiritismo?* (*Qu'est-ce que le*



*Spiritisme?*), ian enkondukon en la scion pri la nevidebla mondo per manifestiĝoj de la Spiritoj, enhavantan la resumon de la principoj de la spiritisma doktrino kaj respondon al la ĉefaj kontraŭdiroj.

■ **1860** – En Marto estas publikigita la dua eldono de *La Libro de la Spiritoj*, super kies titolo nun aperas la esprimo «Spiritualisma Filozofio». Tiu nova eldono, kiu fariĝis la definitiva, enhavas 1019 demandojn aranĝitajn en kvar partoj.

■ **1861** – En la 15<sup>a</sup> de Januaro eliras la unua eldono de *La Libro de la Mediumoj* (*Le Livre des Médiums*), aŭ gvidlibro de la mediumoj kaj



elvokantoj, enhavanta la instruadon de la Spiritoj pri la teorio de ĉi a s p e c a j manifestiĝoj, la rimedojn de komunikado kun la nevidebla mondo, la disvolvigon de la mediumeco, la malfacilaĵojn kaj rifojn, kiujn oni povas renkonti en la praktikado de Spiritismo. Ĝi estas ia kontinuaĵo de *La Libro de la Spiritoj*.

■ **1861** – En la 9<sup>a</sup> de Oktobro, en Barcelono, Hispanio, la episkopo Antono Palau y Termans, ordonas, ke la libroj de Allan Kardec estu publike bruligitaj pro tio, ke ili estas malutilaj kaj kontraŭaj al la katolika kredo.

# Komenco

## de la spiritisma esplorado

**E**n 1848, la distrikto de Hydesville (Novjorko, USONO) vekis la atenton de la tuta mondo: en iu modesta domo, la familio Fox komunikis kun la spiritoj pere de la tiptologio. Tio estis la preludo al epoko, kiam multobligxos la spiritismaj fenomenoj. En la 28<sup>a</sup> de Marto okazis la unuaj fizikaj manifestioj, kaj jam nur post tri tagoj ekestis la tiptologia interkomunikio. Oficialaj komisionoj de la usona registaro, procesoj kaj publikaj aŭdiencoj kontribuis al tio, ke la fakto okupis la paŝojn de la gazetaro. Post ne multe da jaroj, similaj fenomenoj aperis en Eŭropo. Tio estis la fazo de la tiel nomataj «turniantaj tabloj», kiuj fariĝis modo en la mondumaj salonoj kaj ekscitis la publikan scivolemon. Frivolaj sinjorinoj, seriozaj sinjoroj, scienculoj kaj ĉiaspecaj scivolemuloj interesis pri la tabloj, kiuj moviĝadis, kuradis, saltadis, dancadis kaj, per la tiptologio, respondis plej diversajn demandojn.

Kuradis la jaro 1854, kiam profesoro Rivail, pere de iu amiko magnetizisto, S-ro Fortier, informis pri la turniantaj tabloj. Rivail ne opiniis

tiajn fenomenojn entute neeblaj. Li ja dum preskaj tri jardekoj studis la mesmeran magnetismon kaj rigardis la aferon kiel magnetisman fenomenon. «Temas, efektive, pri tre stranga efiko, sed kiu vere ne paŝnas al mi absolute neebla.» Kaj li konsideris: «La magneta fluido, kiu estas propece de la elektro, povas perfekte agi sur la inertajn korpojn kaj igi ilin moviĝi».

Sed, post kelka tempo, S-ro Fortier diris al li, ke la tabloj ankaj respondas al demandoj kaj tenadas dialogojn kun la eksperimentantoj pere de la tiptologio. Tio ja estis tre malsama afero, ĉar ĉi elmontris inteligentecon. Rivail skeptikis: «Jen tute alia demando, kiun mi kredos nur post konstato kaj kiam al mi estos pruvite, ke tablo havas cerbon por pensi, nervojn por senti kaj povas fariĝi somnambulo; ĉis tiam, permesu al mi rigardi la okazon ne alie, ol kiel luldormigan historion». En la libro *Postmortaj Verkoj*, li prezentas la motivojn de sia skeptikeco: «Mia rezonado estis logika; mi komprenis la eblecon de la movado kiel efikon de ia mekanika forto, sed ne konante la kaŭzon kaj la leĝon de la fenomeno, mi rigardis

**1861** – Estas lanĉita la dua eldono de «La Libro de la Mediumoj». Reviziita kaj korektita kun la helpo de la Spiritoj, kaj pligrandigita per granda nombro da novaj instruoj.

**1861** – En Februaro, Kardec

lanĉas la libron *Spiritismo laŭ sia plej simpla esprimo (Le Spiritisme à sa plus simple expression)*, enhavantan resuman prezenton de la instruado de la Spiritoj kaj de liaj manifestioj.

**1862** – En Februaro, Kardec lanĉas la libron *Spiritismo laŭ sia plej simpla esprimo (Le Spiritisme à sa plus simple expression)*, enhavantan resuman prezenton de la instruado de la Spiritoj kaj



de liaj manifestioj.

**1862** – *Spiritisma Vojaĝo en 1862 (Voyage spirite en 1862)* kun jena enhavo: 1. Rimarkoj pri la stato de Spiritismo; 2. Instruado donita de Allan Kardec al diversaj grupoj; 3.

Instruado pri la fando de grupoj kaj societoj kaj ia modelo de regularo por ilia uzo.

**1864** – Kardec publikigas, en Aprilo, la verkon *Imitado de Evangelio laŭ Spiritismo (Imitation de l'Évangile selon le Spiritisme)*,

enhavantan la eksplikadon de la moralaj maksimumoj de la Kristo, ilian konformecon kun Spiritismo kaj ilian aplikadon al la diversaj situacioj de la vivo. Tiu verko, presita ĉe Imprimerie de P.-A. Boudier et C<sup>ie</sup>, Strato Mazarine, 30, havas 444 paĝojn kaj antaŭvenas la verkon *La Evangelio laŭ Spiritismo*.

**1865** – En la 1<sup>a</sup> de Aŭgusto, Kardec publikigas la libron *La Ĉielo kaj la Infero, aŭ la Dia Justeco laŭ Spiritismo (Le Ciel et l'Enfer, ou la Justice Divine selon le Spiritisme)*, enhavantan la komparan studon de la doktrinoj pri la forpaso de la animo, el la enkorpita vivo en



absurda atribui inteligentecon al io pure-nure materia. Mi statis kiel la nuntempaj nekredemuloj, kiuj neas nur pro tio, ke ili vidas fakton al ili nekompreneblan». Resume, por Rivail tiu fakto ĵajne kontraŭis la



leĝojn de la Naturo, pro kio ĉi estis repuĉata de lia prudento. Li poste klarigis: «Ankoraŭ nenion mi vidis, nek observis; la eksperimentoj, farataj en la ĉeesto de honorindaj kaj fidindaj personoj, pravigis mian opinion pri la ebleco de ia pure materia efiko. Sed la ideo de ia *parolanta* tablo ankoraŭ ne eniris al mi en la kapon».

Sed li tamen inklinis mem esploradi, ĉar li cetere jam estis respektata pro siaj kritika juĝado kaj senpartieco. Tiuj liaj trajtoj decide rolis por tio, ke Spiritismo estis prezentita al la homaro sen la riskoj de imagemaj ekscesoj, de personismo, de antaŭjuĝoj kaj atavismoj.

En la komenco de la jaro 1855, profesoro Rivail renkontas malnovan amikon, S-rinon Carlotti, kiu al li faras longan raporton pri la komunikioj de la Spiritoj. Jam de 25 jaroj Rivail konis s-rinon Carlotti, korsikanon energian kaj entuziasman por la novaj ideoj. Kvankam li rekonis en la amiko «grandan kaj belan animon», profesoro Rivail sin tenis prudente ĉe la ekzaltioema temperamento

de Carlotti, kiu tiom da mirindaĵoj rakontis al li, ke anstataŭ lin konvinki li ankoraŭ plimultigis la dubojn de Kardec. «Vi iam apartenos al niaj rondoĵoj», al li diris Carlotti. «Mi tion ne negas; poste ni vidos», al li respondis Rivail.

En Majo de tiu jaro, Rivail kaj Fortier iras al la domo de somnambulino, S-rino Roger. Tie li konas S-rinon Plainemaison kaj S-rinon Pâtier, kiuj al li parolas pri la fenomenoj en la sama senco kiel S-ro Carlotti sed en tute alia tono. Li raportis: «S-ro Pâtier estis publika oficisto, mezaĉa, tre klera, de karaktero grava, malvarma kaj kvieta; lia parolo malrapida, neentuziasma, forte impresis min en tia maniero, ke, invitite de li por ĉeesti la eksperimentojn, kiuj okazis ĉe S-rino Plainemaison, strato Grange-Batelière, 18, mi tuj akceptis». La kunveno estis difinita por la 1<sup>a</sup> de Majo, marde, je la oka vespere. Tie la unuan fojon Kardec ĉeestis la fenomenon de la turnioantaj tabloj, kiuj okazis en kondiĉoj, «kiuj allasis nenian dubon» kaj forte impresis la profesoron.

Rivail ankaŭ vidis kelkajn, «tre neperfektajn» provojn pri senpera mediuma skribo, sur ardezo, helpe de ia korbo. Lia observemo igis lin rimarki, ke tie troviĝas fakto nepre rezultanta el ia kaŭzo, kaj li decidis sin dediĉi al la afero. «Mi duonvidis, ke en tiuj ĵajnaj bagatelaĵoj, en tiuj fenomenoj uzataj kiel

la spiritan vivon, pri la estontaj punoj kaj rekompencoj, pri la anĝeloj kaj la demonoj, pri la eternaj punoj ktp, sekvatan de multaj ekzemploj pri la efektiva situacio de la animo dum kaj post la morto.



**1866** – Estas lanĉita *La Evangelio laŭ Spiritismo (L'Évangile selon le Spiritisme)*, kun sama frontpaĝa teksto kiel la *Imitation*, escepte de la dato kaj la frazo «Tria eldono, reviziita, korektita kaj ĉanĝita». Konstateblas do, ke Kardec rigardis ĉin kiel novan *eldonon* de la antaŭa, malgraŭ ĉia simpligita titolo.


**1868** – En la 6<sup>a</sup> de Januaro, Kardec lanĉis la verkon *La Genezo, la mirakloj kaj la antaŭdiroj laŭ Spiritismo (La genèse, les miracles et les prédictions selon le Spiritisme)*. Parizo, Librairie Internationale. Ĉi estas la lasta libro verkita de Allan Kardec.

**1869** – En la 31<sup>a</sup> de Marto, Allan Kardec subite elkarniĝas dum akcepto de librejkomizo en sia apartamento ĉe Strato Ste.-Anne. Lin trafis la rompiĝo de aorta anejrismo. Lia korpo estis enterigita je tagmezo de la 2<sup>a</sup> de Aprilo en la tombejo de Montmartre.

**1870** – En la 31<sup>a</sup> de Marto estas inaŭgurita la druida monumento ĉe Père-Lachaise.

**1883** – En la 21<sup>a</sup> de Januaro elkarniĝas S-rino Allan Kardec. Post du tagoj, ĉia korpo estas enterigita apud tiu de ĉia edzo, ĉe Père-Lachaise. La funebra procesio eliris el ĉia domo en Villa-Ségur.

**1890** – En Januaro estas lanĉita la libro *Postmortaj Verkoj (Œuvres Posthumes)*. Parizo, Societé de Librairie Spirite. Eldonita de Pierre Gaëtan Leymarie, tiu libro enhavas gravajn tekstojn de Kardec, ĉu teorikarakterajn pri diversaj temoj, ĉu pri faktoj rilataj al la spiritismaj aktivecoj de la majstro.



Pierre-Gaëtan Leymarie




tempopasigilo, troviĝas io serioza, kvazaŭ la malkaĉo de ia nova leĝo, pri kiu mi min devontigis funde studi».

Tuj aperis la okazo por pli atenta observado de tiuj faktoj. En unu el la seancoj ĉe S-rino Plainemaison, profesoro Rivail konis la familion Baudin, kiu tiam loĝis ĉe la strato Rochechouart (en 1856 ili transloĝiĝis al Strato Lamartine). S-ro Baudin invitis lin ĉeesti la semajnajn seancojn, kiujn li okazigis en sia domo. Rivail fariĝis asidua vizitanto.

La mediumoj estis la filinoj de la geedzoj Baudin, la adoleskantaj Caroline kaj Julie, kiuj komence skribis sur ardezo helpe de ia korbeto, nomata fingroturbo (aŭ *turbo*) kaj priskribita en *La Libro de la Mediumoj*. Tiu procedo, kiu necesigis la partoprenon de du personoj, ekskludis ĉian eblecon de influo de ideoj venantaj de la mediumo. Tie profesoro Rivail vidis konstantajn komunikilojn kaj respondojn al faritaj demandoj (iafoje eĉ mensaj demandoj), kiuj evidentigis la agadon de fremda inteligento.

La Spirito, kiu kutime manifestiĝis, sin prezentis sub la nomo Zefiro. «Li estis tre bona kaj sin deklaris protektanto de la familio. Se li ofte uzis la parolon por estigi ridon, li tamen, en okazo de bezono, ankaŭ sciis doni saĝajn konsilojn». Tiel lin priskribis profesoro Rivail, kiu de Zefiro ricevis konstantajn pruvojn de granda simpatio. «Li ne estis tre progresinta Spirito, sed li poste, sub la gvido de la superaj Spiritoj, helpis min en miaj unuaj laboroj. Li poste sciigis al mi, ke li devos reenkarnezi, kaj pri li mi ne plu aŭdis».

Multenombraj estis la ĉeestantoj en tiuj kunvenoj, en kiuj ĉiu persono, laŭ peto, estis facile enlasata. La respondoj de la Spiritoj tuis ĉiutagajn temojn esence ligitajn al la materiala vivo. Ĝis tiam en la kunvenoj regadis etoso de scivolemo kaj amuzo. Etaj frivolaĵoj kaj gajaj demandoj estis ilia ĉefa tono. Nenio efektive serioza. Ĝio ĉaniĝis sub la influo de Rivail: la seancoj komencis preni diskretecan, seriozan karakteron kaj celadis la racian kaj metodan esploron de la nova scienco. Rivail skribis: «Mi tuj komprenis la gravecon de la esplorado, kiun mi entreprenis; mi ekvidis, en tiuj fenomenoj, la plisilon de la tiel obskura kaj diskutata problemo pri la pasinteco kaj la estonteco de la homaro; la solvon de tio, kion mi serĉadis dum mia tuta vivo». Ekde la komenco li rimarkis, ke la objekto de lia esplorado prezentas ian revolucion en la regantaj ideoj kaj kredoj, kaj ĉuste pro tio li kondukis plej



singarde: «Necesis do agi prudente, ne senpripense; esti pozitivisto, ne idealisto, por ke mi ne trompiĝu».

Ĝis la seancoj ĉe S-ro Baudin, profesoro Rivail havis nenian difinitan celon. Tie li faris siajn unuajn seriozajn studojn pri Spiritismo kaj komencis serĉi la solvon de tiuj problemoj, kiuj lin interesis koncerne la filozofion, la psikologion kaj la naturon de la nevidebla mondo. Li formuladis kaj submetadis al la Spiritoj demandojn kun la celo trovi klarigon al problemoj, kiuj perturbis la homaron ekde nememoreblaj tempoj: Dio, la postmorta destino de la homo, la komunikilo kun la tiel nomataj mortintoj. Al ĉiu seanco li venis kun serioj da demandoj jam preparitaj kaj metode aranĝitaj kaj ricevis respondojn precizajn, profundajn kaj logikajn.

En la komenco, Rivail celis nur instrui; poste, kiam li konsciis, ke liaj studoj formas ian tutan kaj prenas la proporciojn de ia doktrino, li ekpensis publikigi la ricevitajn sciojn cele al ĉies instruado. Estis ja tiuj samaj demandoj, kiuj, sinsekve disvolvitaj kaj kompletigitaj, formis la bazon de *La Libro de la Spiritoj*.

Rivail aplikis al la nova scienco, kiel li kutime faris, la eksperimentan metodon: «Mi neniam formulis antaŭpensitajn teoriojn: mi atente observadis, komparadis kaj deduktis la konsekvencojn; deire de la efikoj, mi penadis reiri al ties kaŭzoj per dedukto kaj logika interĉeno de la faktoj, konsentante la validecon de ia klarigo



“Spiritismo  
feliĝas, kaj  
ĉuste tio havigas  
al ĉi  
nekontraŭstareblan  
potencon”  
Allan Kardec

*«Mi neniam formulis antaŭpensitajn teoriojn: mi atente observadis, komparadis kaj deduktis la konsekvencojn; deire de la efikoj, mi penadis reiri al ties kaŭzoj per dedukto kaj logika interŝeno de la faktoj, konsentante la validecon de ia klarigo nur tiam, kiam ĉi povis solvi ĉiujn malfacilaĵojn de la demando.»*

*(Allan Kardec - Postmortaj Verkoj)*

nur tiam, kiam ĉi povis solvi ĉiujn malfacilaĵojn de la demando.»

Unu el la plej fruaj konkludoj el liaj observoj estis, ke la Spiritoj, estante nenio alia ol la animoj de la homoj, posedas nek la superegan saĝon nek la superegan sciencon; ke ilia sciado troviĝas en la limoj de ilia grado de progreso, kaj ke ilia opinio nur valoras kiel persona opinio. Tiu vero, rekonata ekde la komenco, ĉirmis la estontan Kodiginton kaj Spiritismon kontraŭ la kredo, ke la Spiritoj estas neeraremaj. Tiel profesoro Rivail evitadis formuli antaŭtempajn teoriojn, bazitajn sur la asertoj de unu sola aŭ de iuj ne multaj Spiritoj. El tio naskiĝis unu el liaj plej bonaj kriterioj: la kontrolo pri la universaleco de la instruado de la Spiritoj.

Malgraŭ sia temperamento malema al troigoj, profesoro Rivail ne kapis sian entuziasmon pri la vastega kampo, kiu malfermiĝis por lia esplorado: li havis antaŭ si la plösilon de amaso da ĉis tiam neklarigeblaj fenomenoj. La komunikio kun la Spiritoj pruvis la ekziston de ĉirkaŭanta nevidebla mondo, kaj tio estis per si mem grava afero. Sed Rivail ne malatentis duan, ne malpli gravan aferon: pli funde koni tiun mondon kaj ties regulojn. Ĉiu Spirito, laŭ sia persona pozicio kaj siaj scioj, al li malkapis iun aspekton de tiu nekonata mondo. Profesoro Rivail saĝe sin rigardis kiel iun, kiu nur povus koni la staton de iu lando, se li pridemandus ĉiaklasajn loĝantojn, el kiuj ĉiu povas ion instrui kaj neniu povas mem instrui ĉion. Tiel li



*“La historio de la Spiritisma Doktrino estas la historio de la homa spirito”  
Allan Kardec*

konkludis, ke koncernas lin, kiel observanton, kunmeti la tutaĵon helpe de informoj ĉiuflanke ĉerpitaj, kolektitaj, kunordigitaj kaj inter si reciproke kontrolitaj. «Mi agis kun la Spiritoj same kiel mi agus kun la homoj; ili rolis por mi, de la malplej ĉis la plej altranga, kiel informperantoj, ne kiel antaŭdestinitaj revelaciantoj».

Lia seriozece kaj scienca rigoreco lin nature altigis al la rango de gvidanto en la esplorado de la fenomenoj: multaj al li raportis siajn eksperimentojn, kaj pluraj el tiuj, kiuj sin fordonis al la studado de tiuj fenomenoj, lin petis pri ekzameno de ricevitaĵoj komunikaĵoj. Unu el tiuj grupoj al li transdonis ne malpli ol 50 kajorojn kun diversaj spiritaj komunikaĵoj. Ĉe S-ro Baudin, en okazo de lia malĉeesto la grupo ne sciis, kion fari.

En 1856, profesoro Rivail komencis vizitadi ankaŭ la seancojn ĉe S-ro Roustan, Strato Tiquetonne, 14. Kiel mediumo rolis somnambulino, F-ino Ruth Japhet. En tiuj seancoj, seriozaj kaj ordeme direktataj, la komunikaĵoj estis ricevataj helpe de ia beko-korbo. Tiam lia laboro jam estis grandparte farita kaj havis la proporciojn de libro, sed profesoro Rivail intencis ĉin publikigi nur post submeto de la komunikaĵoj al la kontrolo de aliaj Spiritoj kun la helpo de malsamaj mediumoj. Li intencis tion efektivi en la seancoj ĉe S-ro Roustan. Post kelkaj seancoj, la Spiritoj esprimis sian preferon, ke la kontrolo estu farata en privataj seancoj. Ili difinis certajn tagojn por sia laborado kun F-ino Japhet, celante ĉin trankvile plenumi krom ankaŭ eviti maldiskretaĵojn kaj antaŭtempajn komentojn de la publiko.

Sed Rivail iris transen: li submetis la kontrolon al aliaj Spiritoj: «Ĉar la cirkonstancoj metis min en rilatoj kun aliaj mediumoj, mi profitis la sin prezentantaj okazojn por al ili proponi iujn demandojn, kiuj al mi ĉajnis pli malfacilaj. Kaj tiucele pli ol dek mediumoj donis sian helpon por tiu laboro. Estis ja el la komparo kaj kunfandiĝo de ĉiuj tiuj respondoj, ordigitaj, klasitaj kaj multfoje refanditaj en la silento de la meditado, ke mi kunmetis la unuan eldonon de *La Libro de la Spiritoj*».

En la 30<sup>a</sup> de Aprilo de tiu jaro, per la mediumeco de F-ino Japhet, Rivail ricevas la unuan pozitivan anoncon de sia misio. Per tre alegoria parolo, la Spirito (kiu sin ne identigis) informas, ke al li estas komisiita tasko ligita al religio bela kaj inda je la Kreinto, kies fundamentoj jam estas metitaj. Alvenis aliaj, ankoraŭ pli klaraj komunikaĵoj. Tiu anonco estas konfirmita de la Spirito Hahnemann en la 7<sup>a</sup> de Majo 1856 kaj rekonfirmita de la Spirito de Vero en la 12<sup>a</sup> de Junio de la sama jaro. En tiu komunikaĵo - unu el la plej kortuĉaj paĉoj el tiu kolekto de aŭtobiografiaj tekstoj de Allan Kardec - troviĝas la antaŭvido de la grandaj suferoj kaj dolĉaj rekompencoj, kiuj rezultus el la misio al li destinita. ■

# Mia Misio

*Dialogo inter Allan Kardec kaj la Spirito de Vero, okazinta la 12an de Junio 1856 æe S-ro C..., pere de la mediumino F-ino Aline C...*

**D**emandando (al la Spirito de Vero) - Bona Spirito, mi dezirus scii, kion vi pensas pri la misio, kiu, laŭ kelkaj Spiritoj, estas al mi komisiita. Diru, mi petas, æu tio estas ia elprovo por mia memamo. Mi havas, kiel vi scias, plej grandan deziron kontribui por la disvastigo de la vero, sed inter la rolo de simpla laboristo kaj tiu de æefmisiisto estas longa distanco, kaj mi vidas nenion, kio povus pravigi la donon de tiela graco al mi, prefere al multaj aliaj, kiuj posedas talentojn kaj kvalitojn, kiujn mi ne disponas.

**Respondo** - Mi konfirmas, kion oni diris al vi, sed mi al vi konsilas teni vin tre diskrete, se vi volas sukcesi. Vi poste ekscios pri aferoj, kiuj al vi klarigos æion, kio nun kaŭzas al vi miron. Ne forgesu, ke kiel vi povas triumfi, vi tiel same povas fiaski. En tiu æi lasta okazo, iu alia anstataŭs vin, æar la decidoj de Dio ne sidas sur la kapo de unu homo. Vi do neniam parolu pri via misio, æar tio estus vojo al ðia fiasko. ði nur povas praviæi per la efektivigita laboro, kaj vi ankoraŭ faris nenion. Se vi ðin plenumos, la homoj scios rekoni ðin, æar ja laŭ la fruktoj oni rekonas la kvaliton de arbo.

**D.** - Mi certe neniel deziras min glori pri ia misio, kiun mi malfacile kredas. Se mi estas destinata servi kiel instrumento por la decidoj de la Providenco, ði ja disponu pri mi. En æi tiu okazo, mi petas vian helpon kaj la helpon de la bonaj Spiritoj, ke ili min subtenu kaj protektu en mia laboro.




*«Mi tuj komprenis la gravecon de la esplorado, kiun mi entreprenos; mi ekvidis, en tiuj fenomenoj, la plösilon de la tiel obskura kaj diskutata problemo pri la pasinteco kaj la estonteco de la homaro; la solvon de tio, kion mi seræadis dum mia tuta vivo; tio entute ja prezentis ian revolucion en la regantaj ideoj kaj kredoj; necesis do agi prudente, ne senpripense; esti pozitivistoj, ne idealistoj, por ke mi ne trompiøu». Allan Kardec*

**R.** - Nia helpo ne mankos al vi, sed ði restos senutila se, de via flanko, vi ne faros tion necesan. Vi havas vian liberan volon, kiun vi povas uzi laŭ via plaæo. Neniu homo estas devigata fari ion ajn.

**D.** - Kiuj kaŭzoj povus porti min al fiasko? æu la nesufiæeco de miaj kapabloj?

**R.** - Ne; sed la misio de la reformantoj estas plena de rifoj kaj danøeroj. Mi avertas vin, ke la via estos kruda, æar ði celas skui kaj transformi la tutan mondon. Ne supozu do, ke al vi sufiæos publikigi unu, du, dek librojn kaj poste trankvile ripozi en via hejmo. Vi devos elmeti vin mem. Vi naskos terurajn malamojn kontraŭ vi; nerepacigeblaj malamikoj konspiros por via falo; vi baraktos kontraŭ malbonvolemo, kalumnio, æa kontraŭ la perfido de tiuj, kiuj þajnos al vi la plej sindonaj; viaj plej bonaj instruoj estos malþatataj kaj falsataj; pli ol unu fojon vi kurbioos sub la pezo de laciøo; unuvorte: vi devos tenadi preskaŭ senæesan lukton, oferante vian ripozon, vian trankvilon, vian sanon kaj æa vian vivon, æar sen tio vi ja pli longe vivus. Nu bone! ne





malmultaj rezigne retropaŝas, kiam, anstataŭ florplenan vojon, ili nur vidas sub siaj piedoj erikojn, akrepintajn ŝtonojn kaj serpentojn. Por tiaj misioj sufiĉas ne nur inteligento. Necesas unue, por plaĉi al Dio, humileco, modesteco kaj neprofitemo, ĉar Li faligas tiujn, kiuj estas orgojlaj, tromemfidaj kaj ambiciaj. Por lukti kontraŭ la homoj, nepre necesas kuraĝo, persistemo kaj neskuebla firmeco. Ankaŭ estas necesaj prudento kaj takto, por konduki la aferon en konvena maniero kaj ne kompromiti ŝian sukceson per paroloj aŭ decidoj neŭstatempaj. Estas do postulataj sindonemo, abnegaciemo kaj preteco al ĉiaj sinoferoj.

Kiel vi vidas, via misio estas submetita al kondiĉoj, kiuj nur de vi dependas.

### Spirito de Vero

**Mi** - Spirito de Vero, mi dankas pro viaj saĝaj konsiloj. Mi ĉion akceptas, senrezerve kaj senantaŭjuĝe.

Sinjoro! ĉar vi bonvolis turni viajn okulojn sur min por la efektiviĝo de viaj decidoj, plenumiĝu via volo! En viaj manoj sidas mia vivo; disponu pri via servanto. Mi rekonas mian malfortecon antaŭ tiel granda tasko; mia bonvolo ne pereos, sed eble al mi mankos la fortoj. Kompensu al mi la nesufiĉecon; donu al mi la necesajn fizikajn kaj moralajn fortojn. Subtenu min en la malfacilaj momentoj kaj, kun via helpo kaj la helpo de viaj ĉielaj kurieroj, mi ĉiel klopodos por respondi al viaj decidoj.

**NOTO** - Ĉi tiun noton mi skribas en la 1<sup>a</sup> de Januaro 1867, dek jarojn kaj duonon post kiam mi ricevis la ĉi-supran komunikaĵon, kaj mi atestas, ke ĉi ĉiupunkte plenumiĝis, ĉar mi spertis ĉiujn al mi antaŭdiritajn suferojn. Mi luktadis kun la malamo de nerepacigeblaj malamikoj, kun insultado, kalumniado, envio kaj ĵaluzo; fiajn akuzojn oni al mi adresis publike; miaj plej bonaj instruoj estis falsitaj; ja min perfidis tiuj, kiujn mi plej konfidis; pagis al mi per nedankemo tiuj, al kiuj mi faris servojn. La Pariza Societo fariĝis centro de senĉesaj intrigoj teksitaj kontraŭ mi ĝuste de tiuj, kiuj sin deklaris favoraj al mi, sed kiuj, montrante amikan vizaĝon en mia ĉeesto, min batis de post la dorso. Oni asertis, ke tiuj, kiuj restis fidelaj al mi, estis miaj salajruloj, kiujn mi pagis per mono gajnita dank'al Spiritismo. Mi neniam plu ĉuis ian ripozon; pli ol unu fojon mi falis sub troa laborado, mia sano kaj mia vivo difektiĝis.

Sed dank'al la protekto kaj helpado de la bonaj Spiritoj, kiuj al mi senĉese donis evidentajn pruvojn de sia prizorgemo, mi havas la ŝojon konfesi, ke mi neniam sentis plej etan malvigliĝon aŭ senkuraĝiĝon, kaj ke mi daŭre klopodis, kun konstanta fervoro, por la plenumado de mia tasko, ne farante al mi zorgon pri la malico, de kiu mi estis objekto. Laŭ la komunikaĵo de la Spirito de Vero, mi ja devis ĉion ĉi renkonti, kaj ĉio ja efektiviĝis.

Sed ankaŭ, krom tiuj suferoj, kiom da ŝojoj mi spertis, vidante la verkon kreskadi en tiel mirinda maniero! Per kiaj mildaj kompensoj miaj ĉagrenoj estis pagitaj! Kiom da benoj kaj da atestoj pri vera simpatio mi ricevis de multaj afliktitoj, kiujn la Doktrino konsolis! Tian rezulton al mi ne anoncis la Spirito de Vero, kiu sendube intence, nur montris al mi la malglataĵojn de la vojo. Kia ne estus do mia maldankemo, se mi plendus! Se mi dirus, ke estas ia kompensa rilato inter bono kaj malbono, mi ne parolus la veron, ĉar la bono - mi aludas la moralajn ŝojojn - tre multe superis la malbonon. Kiam mi spertis elreviĝon, ian ajn ĉagrenon, mi per la penso altiĝis super la homaro kaj anticipe portiĝis al la mondo de la Spiritoj, kaj ĉe tiu pinta supraĵo, de kiu mi rigardis la punkton de mia alveno, la mizeroj de vivo superpasis kaj min ne trafis. Mi al tio tiele kutimiĝis, ke la kriegado de la malbonuloj neniam perturbis min. 📖

(El la libro "Postmortaj Verkoj", Allan Kardec, publikigita en Parizo, 1890)

# Spiritismo

*La intensa laborado de Kardec ebligis, ke en malpli ol du jardekoj la Spiritisma Doktrino estu kodigita, anoncanta ian novan eraon por la homaro.*

**D**um dek kvar jaroj Allan Kardec esploris la spiritismajn fenomenojn, ilin observis, analizis, kontrolis kaj fine kodigis la instruojn ricevitajn de la Spiritoj. Dum tiu mallonga tempo, li skribis milojn da paĝoj, el kiuj formiĝis libroj kaj eldonoj de la Spiritisma Revuo. Lia enorma laborkapablo ampleksis la prezidantecon de la Pariza Spiritisma Societo kaj intensan korespondadon kun legantoj kaj admirantoj el diversaj landoj.

En la 1<sup>a</sup> de Januaro 1867, li en noto raportas pri la amplekso de la venkitaj defioj: lin celadis la malamo de obstinaj malamikoj, insultoj, kalumnioj, envio kaj ĵaluzo. La gazetoj fariĝis akceptema kampo por ke kontraŭuloj de Spiritismo dissemu misfamigojn kaj atakojn, el kiuj multaj estis al li rekte adresitaj. Li ricevis akrajn leterojn, senmotivajn agresojn. Liaj vortoj estis distorditaj, liaj libroj bruligitaj. Lin perfidis ŝuste tiuj, kiujn li plej konfidis, kaj ne malofte li ricevis maldankon pro la bono dissemita. Eĉ la Pariza Societo alportis al li aĝrenojn: intrigoj kaj apenaŭ maskitaj ĵaluzoj fontis el tiuj, kiuj devis lin kamaradi en la laboroj por la Bono. Oni elmetis lin al ridindigo, lin celis la suspektemo de tiuj kredantaj, ke Spiritismo riĝigis lin. Li konfesis: «Mi ne plu ŝuis ripozon; pli ol unu fojon mi falis sub troa laborado, mia sano kaj mia vivo difektiĝis». Sed - kiel li poste asertis - la estonteco estis skribita antaŭ li per nekontestablaj signoj, pro kio Spiritismo fariĝis la verko de lia vivo.

Li neniam lasis sin regi de senkuraĉeco, kiu ja ne apartenis al lia firma karaktero: «Mi min fordonis al mia laboro kun senĉanĝa fervoro, ne farante al mi zorgon pro la min celanta malbovolemo». Anticipe eksciinte, de sia protektanta Spirito, pri la lin atendantaj sortoĉanĝoj, li eĉ tiel ne senkuraĉiĝis.

Unu el la plej sovaĝaj reagoj kontraŭ la naskiĝanta Spiritisma Doktrino okazis je la 10h30 de la 9<sup>a</sup> de Oktobro 1861, en placo de la urbo Barcelono, en Hispanio. En loko, kie estis ekzekutataj mortkondamnitaj krimuloj, kaj laŭ ordono de la urba episkopo, oni bruligis 300 librojn pri Spiritismo, inter kiuj troviĝis: *La Libro de la Spiritoj*; *Spiritisma Revuo*; *La Libro de la Mediumoj*; *Kio estas Spiritismo*; *Fragmento de Sonato, diktita de la Spirito Mozart*; *Letero de Katoliko pri Spiritismo, de D-ro Grand*; *Historio de Johanino Dark, de ĉi mem diktita al F-ino Ermance Dufaux*; kaj *La realeco de la Spiritoj demonstrita per la senpera mediuma skribado, de barono de Guldenstubbé*.

La ĉefaj gazetoj de Hispanio raportis la okazon kaj bedaŭris la revenon de absolutismo, sed en Francio la liberalaj gazetoj limiĝis al senkomenta mencio de la fakto. La gazeto *Siècle*, kiu, laŭ Kardec, «tiel arda montriĝis por denunci la misuzojn de povo kaj la plej malgrandajn netoleremajn agojn de la klerikaro», publikigis eĉ ne unu malaprobant vorton, dum aliaj malpli gravaj gazetoj opiniis la epizodon ridinda. Kardec protestis: «Eĉ se oni flanken metas ĉian kredon, tamen tie ekzistis ia principa demando pri internacia juro, kiu al ĉiuj interesis kaj preter kiu oni ne tiel facilanime pasus, se temus pri certaj aliaj verkoj. Ili ne silentigas la cenzuron, kiam temas pri simpla rifuzo de fiska marko por vendo de materialisma libro; nu, multe pli grava montriĝis

la fakto, ke la Inkvizicio starigis siajn ĉtiparojn, kun la iama soleneco, ĉe la pordoj de Francio. Kial do tia indiferenteco? Ja tial, ke temis pri ia doktrino, kies progreson la nekredemo konstatis kun timego; depostuli por ĉi justecon estis rekoni al ĉi rajton je



*Ilustraĵo pri la Turniĝantaj Tabloj*

protekto de la aŭtoritato krom ankaŭ ĉin plikreditigi». La Kodiginto rimarkigis, ke la Barcelona aŭtodafeo, pro sia postefiko, potence kontribuis al la disvastiĝo de la spiritismaj ideoj. Tiu okazaĵo ankaŭ rezultigis multajn komunikaĵojn fare de la Spiritoj. Unu el ili, ricevita la 19<sup>an</sup> de Oktobro en la Pariza Spiritisma Societo, asertis, ke la brutalaĵo «estis plenumita kun la celo altiri la atenton de tiuj ĵurnalistoj, kiuj rilatis indiferece al la profunda agitacio reganta la urbojn kaj la spiritistajn societojn». Kardec ricevis, el Barcelono, desegnon prezentantan la scenon de la aŭtodafeo kaj el ĉi faris reduktitan fotografadon. Li ankaŭ konservis, en kristala urno, cindrojn aĉerpitajn en la pŝiparo, en kiuj troviĝis ankoraŭ legeblaj fragmentoj de bruligitaj folioj.

## La Spiritista Gvidanto

Sed se estis doloroj, tamen ankaŭ al li venis dolaj kompensoj. Neniam mankis al li la protekto kaj la helpo de la bonaj Spiritoj. Lin konstante helpis, bona kaj zorgema, la Spirito de Vero. Ee preskriboj por lia sano estis donitaj al li. Ae pluraj komunikaĵoj, la Spiritoj konsilis al li prudenton, moderon kaj sindediĝon, por ke li povu plenumi sian mision. La Spirito de Vero rekomendis al li: «Neniam parolu pri via misio: tio estus vojo al ĉia fiasko». Kaj li ja obeis: liaj libroj kaj la Spiritisma Revuo ellaboriĝis en pleja silento. La Spirito de Vero atestis sian deziron protekti lin, kapante sian identecon, kaj en la 25<sup>a</sup> de Marto 1856, ae s-ro Baudin, Kardec demandis: «Mia familiara Spirito, kiu ajn vi estas, mi vin dankas, ke vi vizitas min; ae vi bonvolus diri, kiu vi estas?» Kaj li aŭdis, kiel respondo: «Por vi, mi nomiĝos *Vero*». Ĝuste dek kvin tagojn poste, en tiu sama loko, tiu Spirito donas al li kortuban ateston pri amo, ae demando de Kardec: «Vi diris, ke vi estos al mi ia gvidanto, ke vi min helpos kaj protektos; mi prezentas al mi tiun protekton kaj ties celon kadre de certa ordo de aferoj, sed ae vi bonvolus diri al mi, ae tiu protekto ankaŭ etendiĝas al la materialaj zorgoj de la vivo?» Kaj li ricevas jenan, dolan respondo: «En ĉi mondo multe gravas la materiala vivo; al

*«La Spiritisma Doktrino signas gravegan etapon en la progreso de la homaro, ne trudas ian kredon, sed invitas al studado, elpurigante la racion kaj la senton kaj kontentigante la konsciencon.»*  
(Allan Kardec)

**vi ne helpi vivi, estus same kiel ne ami vin»**  
Kelkan tempon poste Kardec reliefigas, ke la protekto de tiu Spirito, kies superecon li tute ne povus supozi, efektive neniam mankis al li.

En multaj okazoj, li preparolis sian feliĝon pro la konstato de la mireginda progreso de Spiritismo. «Per kiom da dolaj konsoloj miaj agrenoj estis kompensitaj! Kiom da benoj, da atestoj pri vera simpatio mi ricevis de la sennombraj afliktitoj, kiujn la Doktrino konsolis! Tian rezultaton ne antaŭdiris al mi la Spirito de Vero, kiu sendube volis montri al mi nur la



*La Antaŭparolo al "La Libro de la Spiritoj" estas subskribita de respektindaj figuroj, kiel Johano Evangeliisto, Sankta Aŭgusteno, Sankta Vincento de Paylo, Fénelon, Sokrato kaj Platono.*



malfacilaĵojn de la vojo. Kiel granda ne estus do mia sendanko, se mi plendus!» Li krome skribis, ke æe la alveno de ia elreviĉo, de ia ajn æagreno, li per la penso altiĉis super la homaro. «Mi anticipu portiĉis al la mondo de la Spiritoj, kaj æe tiu pinta supraĵo la mizeroj de la vivo superpasis kaj min ne trafis. Mi al tio tiele kutimiĉis, ke la kriegado de la malbonuloj neniam perturbis min».

## La epoko de la racio

La mondo estis longe preparita por akcepti la Konsolanton promesitan de Jesuo. Post la Mezepoka obskurantismo, sonis la horo por ekesto de la epoko de racieco. La okcidenta kulturo ellaboriĉis, laŭlonge de la jarcentoj, per la kontribuoj de la Arto, de la Filozofio, de la sciencaj progresoj. La estetika sento, kiu rafiniĉis ekde la Renesanco, disvolviĉis post tri jarcentoj da subluma muziko. Iluminismo postlasis profundajn sulkojn. Ekestis la superregado de logiko. Floradis la diversaj branĉoj de la Scienco. La Mezepokaj valoroj renversiĉis æe la renoviga blovo de ia epoko, en kiu la homoj seræadis raciajn klarigojn kaj pridiskutis la tradician religion. La aŭroro de la jarcento XVIII, la enciklopedia jarcento, anoncis la nepran disfalon de nesciado, misuzoj kaj superstiĉoj, kiuj cedos lokon al sekularizo kaj al libereco de esprimo. Kaj ja tiel nepre devus okazi, æar, se kontraŭe, la spiritismaj ideoj estus denaskiĉe premsufokitaj, trafitaj de fanatikeco kaj cenzuro.

Francio fariĉis ia kultura centro. Parizo solidigis sian famon de æefurbo de intelekto, beleco kaj arto. En la politika kampo, Johanino Dark jam konkeris la teritorian unuecon. Antaŭ iom pli ol jarcento, la lando baniĉis per sango pro kontestado de la regadsistemo. Post la fino de la proletara ribelo, Napoleono Bonaparto konkeris la regadon kun la misio restarigi la socian ordon. Kaj kvankam la generalo

*La spiritismaj komunikaĵoj de tiuj personoj kiel Mozart, Homero, Fënelon; la eksplikado de popolaj legendoj kaj kredoj; kaj la esplorado pri spiritismaj fenomenoj raportitaj en taggazetoj aliris diverslandajn abonantojn al la "Spiritisma Revuo".*

lasis sin enretiĉi en vantamo kaj fiero (legu sur paĉo. 28), li tamen havigis al Francio ian Kodon (promulgitan en la sama jaro de la enkarniĉo de Kardec), certigantan la individuan liberecon, la egalecon antaŭ la leĉo kaj la rajton al la privata propio, inter aliaj progresoj.

Estis en tia medio de socikultura rafiniteco, ke Spiritismo aperis. En la komenco de 1857 jam estis preta la manuskripto de *La Libro*

*de la Spiritoj*, kiun la eldonisto E. Dentu sendas al la Imprimerie de Beau, æe Saint-Germain-en-Laye, je 23 km de Parizo. Geedzoj Rivail pagis æiujn elspezojn de la eldonado.

## La Libro de la Spiritoj

La unua eldono eliras en la 18<sup>a</sup> de Aprilo de tiu jaro kaj enhavas la principojn de la Spiritisma Doktrino «pri la senmorteco de la animo, la naturo de la Spiritoj kaj ties rilatoj kun la homoj, la moralaj leĉoj, la nuntempa vivo, la estonta vivo kaj la estonteco de la homaro, laŭ la instruado donita de la Superaj Spiritoj pere de pluraj mediumoj, kolektitajn kaj ordigitajn de Allan Kardec». Estas do en tiu verko, ke Rivail alprenas la pseŭdonimon Allan Kardec, kaj, laŭ la Spirito Zefiro, tiu estis la nomo de la Kodiginto en iu pasinta ekzistado, kiun li travivi æe la keltoj kiel druida sacerdoto.

La unua eldono de *La Libro de la Spiritoj* havis nur 176 paĉojn, 24 æapitrojn kaj 501 demandojn, aranĉitaj en tri partoj. 17 notoj de Kardec okupas dek du paĉojn en la librofino. Anstataŭ konkludoj nur aperas Epilogo okupanta malpli ol unu paĉon. Kardec ankoraŭ anoncis la aperon de ia suplemento kun novaj instruoj, sed li rezignis tiun ideon kaj ellaboris duan eldonon «tute reverkitan kaj multe pligrandigitan», kiun li publikigis en Marto 1860. Krom efektive



*"Pli bone ol æia ajn kredo, Spiritismo sentigas al ni la neceson de individua pliboniĉo, æar per ŉi la homo scias, de kie li venas, kien li iras kaj kial li vivas sur la Tero; ŉi montras al li ian celon, ian praktikan utilecon; ŉi preparas lin ne nur por la estonteco sed ankaŭ por la nuno, por la socio". (Allan Kardec)*

duobligi la nombron de la demandoj, li faris diversajn aliajn paŝojn, el kiuj unu troviĝas ĉe la Antaŭparolo, nun portanta pli longan tekston kaj la subskribojn de tiaj figuroj kiel Sankta Johano la Evangeliisto, Sankta Aŭgusteno, Sankta Vincento de Paŭlo, Sankta Ludoviko, La Spirito de Vero, Sokrato, Platono, Fénelon, Franklin kaj Swedenborg. La vinbertrunko, desegnita de la Spiritoj mem kaj stampita sur la supro de ties paĝo, kiel emblemo de la laboro de la Kreinto, estas la sola grafika elemento de la tuta Spiritisma Kodigo.

*“La kredo en la estonta vivo estas do elemento de progreso, ĉar ĝi stimulas la Spiriton. Nur ĝi povas havigi al ni kuraĉon en la elprovado, ĉar nur ĝi klarigas ties kaŭzojn kaj nin admonas al persistado en la lukto kontraŭ malbono, se ni volas konkeri nian destinon”.*  
(Allan Kardec)

temoj. La spiritismaj komunikaĵoj de tiaj figuroj kiel Mozart, Homero, Fénelon, la klarigoj pri popolaj kredoj kaj legendoj kaj la esplorado de spiritismaj fenomenoj, disvastigataj en la gazetaro, altiris abonantojn el pluraj landoj. La apero de la Revuo neniam interrompiĝis dum la materia vivo de Kardec. La oficejo de la Revuo funkciis en lia domo, kaj li mem ĝin tutan redaktis kaj sin okupis pri ĝia ekspedo. Li samtempe verkadis novajn librojn, administris la Parizan Spiritisman Societon, akceptis centojn da vizitantoj kaj korespondis kun personoj el la tuta mondo.

## La Spiritisma Revuo

Sep monatojn post la lanĉo de *La Libro de la Spiritoj*, en la 15<sup>a</sup> de Novembro 1857, Kardec submetas al la Superaj Spiritoj sian ideon fondi spiritisman gazeton. Lin urĝis la timo, ke aliaj elpapo antaŭe. Per la mediumeco de Ermance Dufaux al li venis multaj konsiloj, inter kiuj la jena: Vi komence devas kontentigi la scivolon; kunigi tion seriozan kun tio agrabla: tio serioza altiros la scienculojn, tio agrabla plezurigos la vulgarularon. Ĉi-lasto estas esenca, sed la alia pli gravas». Ĝuste kvardek kvin tagojn poste, Kardec lanĉis la organon *Spiritisma Revuo – Gazeto de Psikologiaj Studoj*. Dum la sekvintaj dek du jaroj, kiel la Spiritoj antaŭdiris, la Revuo estis ege sukcesa. Viglenhava, ĝi raportis pri fizikaj aŭ inteligentaj manifestiĵoj de la Spiritoj, pri aperoj kaj elvokoj, krom ankaŭ pri ĉiuj novaĵoj rilataj al Spiritismo. Ĝi estis vera laboratorio. En ĉiuj numeroj Kardec atestis sian kuraĉon, ĵurnalistan juĝkapablon kaj elegantan humursenton. Liaj respondoj al la misfamigantoj de Spiritismo estis memorindaj, kun allogaj titoloj kaj pensigaj



## La Pariza Societo

La Pariza Societo por Spiritismaj Studoj originis el seancoj en la domo de la geedzoj Allan Kardec, ĉe Rue des Martyrs, 8. Ermance Dufaux rolis kiel ĉefa mediumo. Pro la kreskanta nombro da vizitantoj, necesis trovi pli vastan ejon, kaj la solvo estis luado de ĉambro kaj divido de la elspezoj inter la membroj de la societo, kies laŭleĝa fondo okazis en la 1<sup>a</sup> de Aprilo 1858. Estis en la semajnaj kunvenoj de la Societo, ke okazis plejparto de la mediumaj kaj porstudaj seancoj direktataj de Kardec. La seancoj ne estis malfermataj al la publiko, kvankam okazis «generalaj kunsidoj», en kiuj estis enlasataj vizitantoj proponitaj de membroj de la Societo.

Unu el la plej notindaj faroj de Allan Kardec estis la granda kvanto da libroj, verkoj kaj eldonoj de la Revuo, kiujn li skribis. En 1858, li publikigis ian *Praktikan Instrulibron pri la Spiritismaj Manifestiĵoj*, kiu enhavis kompletan prezenton de la kondiĉoj necesaj por komunikiĝo kun la Spiritoj krom ankaŭ de la rimedoj por disvolvo de la mediumeco. Post la publikigo de *La Libro de la Mediumoj*, en la 15<sup>a</sup> de Januaro 1861, Kardec ĉesigis la presadon de tiu *Instruction*, kiun li rigardis devancita de tiu nova verko.

En 1859, li lanĉis la verkon *Kio estas Spiritismo*, nome

*“Per sia morala pliboniĝo, la homoj preparas sur la Tero la regnon de paco kaj frateco. La Spiritisma Doktrino estas do la plej potenca moraligilo, ĉar ĝi samtempe sin turnas al la koro, al la intelekto kaj al la bone komprenata persona intereso”.*  
(Allan Kardec)

ian enkondukon en la konadon de la nevidebla mondo pere de la manifestiøoj de la Spiritoj, enhavantan resumon de la spiritismaj principoj kaj respondojn al la æfaj obŭetoj. En Marto 1860 eliras la dua eldono de *La Libro de la Spiritoj*. Nun, super la titolo, aperas la esprimo «Spiritualisma Filozofio». Tiu nova eldono, definitiva, prezentas 1019 demandojn, aranøitajn en kvar partoj, riæiøas per la Konkludoj kaj ne plu havas alfabetan indekson. Neniaparte estas plu uzita la dukolumna aranøo, kaj la notoj, en pli granda nombro ol antaŭe, aperas tuj post la respondoj de la Spiritoj.

## Novaj libroj

*La Libro de la Mediumoj*, aŭ gvidlibro de la mediumoj kaj elvokantoj, estis lanæita kiel kontinuaŭo de *La Libro de la Spiritoj*. Øi enhavas la instruadon de la Spiritoj pri la teorio de æiaspecaj manifestiøoj, la rimedojn de komunikado kun la nevidebla mondo, la disvolviøon de la mediumeco, la malfacilaŭojn kaj rifojn, kiujn oni povas renkonti en la praktikado de Spiritismo.

En Februaro 1862, la Kodiginto publikigas la verketon *Spiritismo laŭ sia plej simpla esprimo*, enhavantan resumon prezenton de la instruado de la Spiritoj kaj de ties manifestiøoj. En la sekvinta jaro li lanæas la libron *Spiritisma Vojaøo en 1862*, kiu enhavas liajn rimarkojn pri la stato de Spiritismo, instruojn pri la fondo de grupoj kaj societoj, ian modelon de regularo por la spiritismaj societoj kaj tri paroladojn de Kardec al la spiritistoj de Lyon kaj Bordeaux.

*Imitado de Evangelio laŭ Spiritismo* estas lanæita en Aprilo 1864. La vorto «imitado» devas esti komprenata en la senco de «praktikado». Tiu libro enhavas la eksplikadon de la moralaj maksimumoj de la Kristo, ilian konformecon kun Spiritismo kaj ilian aplikadon al la diversaj situacioj de la vivo. Øi antaŭvenis la verkon *La Evangelio laŭ Spiritismo*, kaj la titolpanøon sugestis la eldoninto, S-ro Didier, kaj aliaj personoj. En 1866, okaze de la publikigo de *La Evangelio laŭ Spiritismo*, Kardec sciigas, ke malgraŭ la titolpanøo li rigardis tiun verkon kiel novan eldonon de la *Imitado*. Temis do pri la tria eldono de *La Evangelio*, kiu fariøis definitiva. Pri tiu libro la Spiritoj asertis, ke øi havos konsiderindan influon,



*“Kiom da koroj estis frue konsolitaj de tiu religia kredo! Kiom da larmoj sekiois! Kiom da konsciencoj malfermiøis por tiu radio de spirita beleco!”*  
(Camille Flammarion)

æar øi elvolvas æefinteresajn demandojn: «Ne nur la religia mondo trovos en øi la bezonatajn maksimumojn, sed ankaŭ la popoloj en øi æerpos, por sia praktika vivo, plej bonajn instruojn».

En la 1<sup>a</sup> de Aŭgusto 1865, Allan Kardec lanæas la verkon *La Aielo kaj la Infero, aŭ la Dia Justeco laŭ Spiritismo*. Øi enhavas la komparan studon de la doktrinoj pri la forpaso de la animo el la korpa vivo en la spiritan vivon, pri la estontaj punoj kaj rekompencoj, pri la anøeloj kaj demonoj, pri la eternaj punoj. Øi ankaŭ prezentas multajn ekzemplojn pri la efektiva situacio de la animo dum kaj post la morto.

En 1866, li serioze malsaniøis pro troa laborado kaj zorgoj. Lin kuracis la Spirito D-ro Demeure, kiu avertis lin pri la limoj de liaj korpaj fortoj. Pro insistado de tiu Spirito, li ricevas la helpon de iu sekretario,

S-ro Desliens, por la ordinara korespondado kaj la plej materialaj taskoj.

Sian lastan libron Kardec publikigas en la 6<sup>a</sup> de Januaro 1868 - *La Genezo, la mirakloj kaj la antaŭdiroj laŭ Spiritismo*. Antaŭsentante sian baldayan elkarniøon, la Kodiginto preparis la kondiæojn por daŭrigo, post sia morto, de la studoj en la Pariza Societo, kaj tiucele li aranøis centran komitaton por lin anstatayi.

## La elkarniøo

En la 31<sup>a</sup> de Marto 1869, Allan Kardec estis en preparoj por forlasi sian loøejon æe Rue Ste.-Anne. Li intencis transloøiøi al la Villa Ségur. Sed, dum akcepto de iu libreja komizo, li subite elkarniøis. Øia plej probabla kaŭzo estis rompiøo de aorta aneyrismo.

Dek unu jarojn post sia lanæo, *La Libro de la Spiritoj* jam atingis la 15<sup>an</sup> eldonon, Spiritismo okupis la centron de la debatoj kaj vastega estis la korespondado de Kardec. La morto surprizis lin meze de senlaca aktiveco. Kiam li elkarniøis, li sin dediæadis al verko pri la rilatoj inter magnetismo kaj Spiritismo.

Lia korpo estis enterigita je tagmezo de la 2<sup>a</sup> de Aprilo en la tombejo de Montmartre. Oni taksis pli ol mil la nombron da personoj, kiuj akompanis la funebran procesion. Aæe la tombo, la astronomo Camille Flammarion, mediano de la Pariza



Societo, eldiris sian faman paroladon, en kiu li nomas la Kodiginton «la enkarnejo de la komuna saĝo». Li konvinkoplene asertas: Vi reiris en tiun mondon, de kiu ni ĉiuj venis, kaj vi jam rikoltas la fruktojn de viaj surteraj studoj.


Kaj li finas emociplene: «Ĉis revido, mia kara Allan Kardec, ĉis revido!»

En la unua kunsido de la Pariza Societo post la elkarniĝo de Allan Kardec, la aĉestantoj esprimis la ideon konstrui monumenton al la liona majstro. Al tiu ideo aliĝas spiritistoj el diversaj urboj. La rezulto estis la starigo de dolmeno en la tombejo Père-Lachaise, kien la restaĵoj de Kardec estis translokigitaj en la 29<sup>a</sup> de Marto 1870. Post du tagoj okazis la

*“Pro la fido al la estonta vivo, la rondo de la ideoj plivastigas, la estonteco entenigas en la nunto, la persona progreso havas ian celon, ian efektivan utilecon. El la kontinuaj rilatoj inter la homoj naskiĝas la solidareco; la frateco radikas en la leĝo de la Naturo kaj en la intereso de ĉiuj.”*  
(Allan Kardec)

inaĝuro de la monumento, sur kiu ankoraŭ ne estis skribita la frazo: «Naskiĝi, morti, denove renaskiĝi kaj senĉese progresi, tia estas la leĝo.» Male al oftaj asertoj, tiu frazo, aĉizita sur la dolmeno en 1870, ne estas originala teksto de Allan Kardec, sed ĉi ja tute konformas al la spiritisma filozofio. Nuntempe la tombo de Allan Kardec estas tiu plej vizitata kaj florumamita de Père-Lachaise.

En la 21<sup>a</sup> de Januaro 1883, elkarniĝas S-rino Allan Kardec, kaj ŝia korpo estas enterigita apud tiu de ŝia edzo. Preskaŭ 21 jarojn post la elkarniĝo de Allan Kardec, en

Januaro 1890, liaj amikoj lanĉas la libron *Postmortaj Verkoj*, enhavantan kolekton da eseoj kaj personaj notoj pri diversaj temoj, krom ankaŭ memoraĵoj pri liaj aktivecoj kaj planoj por la estonteco. 

# Kardec

## kaj praktikado de karitato

S


ur la paĝoj de *La Evangelio laŭ Spiritismo*, Allan Kardec admonas al praktikado de karitato, kiun li montras kiel vojon al elĉeto. Kaj en multaj okazoj ni vidas lin praktikanta la amon al la proksimumo.

Profesoro Rivail kaj lia edzino Amélie kune kontraŭbatalis la sociajn antaŭjuĝojn kaj defendis noblajn aferojn kiel la liberecon de la instruado kaj la edukadon de la junulinoj. Jam antaŭ ol kodigi Spiritismon, Rivail ĉiam elmontris sentemon por la aliula suferado kaj por la nefavoritoj de la sorto: li protektis vidvinojn kaj orfojn kaj, en la de li fonditaj lernejoj, li donis senpagajn lecionojn al malriĉaj lernantoj.

Esprimoplena teksto pri lia ĉiam nobla sintenado troviĝas en la verko *Amo kaj Malamo*, diktita de la Spirito Charles al la mediumino Yvonne A. Pereira. La romano, kies loko de agado estas Francio en la jarcento XIX, rakontas la historion de ekslernanto de Rivail, kiun oni

maljuste akuzis pri grava krimo. En la karcero li ricevis la viziton de la profesoro, «kiu lin varmakore konsolas, revigligante liajn moralajn energiojn per saĝaj kaj prudentaj konsiloj». Sed ne nur tio: li subtenis la patrinon de la iama disĉiplo kaj serĉis helpi ŝian amikon, petante pri ilia klopodado, ke la proceso estu reviziata kaj la junulo ne estu mortkondamnita.

La geedzoj Rivail havis simplan vivon kaj kelkfoje spertis financajn malfacilaĵojn. Malmultajn jarojn post la geedziĝo, ili perdis sian havaĵon pro la neantaŭzorgemo de iu parenco kaj de iu supozata amiko. Eĉ travivante tiom da malfacilaĵoj, ili aplikadis siajn nesufiĉajn rimedojn al la eldonado de spiritismaj verkoj. En la plej malfacilaj jaroj, profesoro Rivail plibonigis siajn elspezojn per modestaj okupoj kiel ekzemple librotendado.

Li posedis domon en la Villa Ségur, kaj li deziris, ke ĉi transformiĝu, post la elkarniĝo de ambaŭ, en rifuĝejon por malriĉaj spiritistoj. Tio estis la lasta esprimo de la natura boneco, kiu ĉiam karakterizis lian spiriton. 

*“Ja tiel mi komprenas la kristanan karitaton, mi komprenas religion, kiu preskribas redoni bonon pro malbono, kaj ankaŭ pli prave redoni bonon pro bono. Sed mi neniam komprenus ian religion, kiu al ni preskribus redoni malbonon pro malbono.”*  
(Allan Kardec)

# Sur la paposignoj de Kardec

**L**

a Ducentjara Datreveno de Naskiø de Allan Kardec nin kondukas al diversaj konsideroj: de la memkomprenebla analizo de la signifo de la Bazaj Verkoj de la Spiritisma Doktrino kaj ties influado sur la brazilan socion øis la historiaj rememorigoj.

La fakto, ke la 4<sup>a</sup> Tutmonda Kongreso de Spiritismo, kiel ero de la memorfestoj de tiu æi-jara evento, okazos en la franca æefurbo, ja elvokas scivolan deziron koni tiujn lokojn ligitajn al la vivo kaj verko de la Kodiginto.

La æefaj eventoj, ligitaj al la agado de profesoro Hippolyte Léon Denizard Rivail antaý la Spiritisma Kodigo kaj al lia aktivado kiel Allan Kardec, povas esti rebildigitaj per rapida rigardo, laý kronologia sinsekvo, al tiuj lokoj, kiujn la spiritistoj konsideras historie gravaj.

Praviøas reliefigi, ke ni atingas la centkvindekjarecon de du signifoplenaj epizodoj. En la jaro, 1854 Prof. Rivail unuafoje aydis pri la turniøantaj tabloj æe S-ro Fortier. En Majo 1855, li iris æe la mediumino S-rino Roger kaj poste æe S-rino Plainemaison.

Prof. Rivail unuafoje æeestis la fenomenojn de la turniøantaj tabloj kaj de media skribado sur ardezoj dum seanco por eksperimentoj pri tiaj manifestiøoj, okazintaj en la domo de S-rino Plainemaison, æe *rue de la Grange Batelière*, 18. En tiuj

okazoj, li ankaý konatiøis kun la familio Baudin kaj ricevis inviton por partopreni aliajn seancojn. Tiam li komencis submeti demandojn al la komunikiantaj spiritoj kaj ekhavis la ideon publikigi la ricevatajn instruojn.

Dum la jaro 1856, li ankaý komencis vizitadi la seancojn æe S-ro Roustan kaj f-ino Japhet, æe *rue Tiquetonne*, 32. La Kodiginto rimarkigas en raporto publikigita en *Postmortaj Verkoj* (2<sup>a</sup> Parto, p. 242): «*Tiuj seancoj estis seriozaj kaj ordeme direktataj*». En tiuj seancoj li ricevis, per la mediumeco de f-ino Aline C., la unuan revelacion pri sian misio. Tie li ankaý submetis la originalojn de *La Libro de la Spiritoj* por reviziado pere de f-no Japhet. Poste li samcele konsultis aliajn mediumojn.

La ellaborado de *La Libro de la Mediumoj* fariøis en lia kabineto, en lia domo æe *rue des Martyrs*, 8 (2<sup>a</sup> etaøo, malantaýa parto). La Kodiginto raportas pri noktaj bruoj en sia kabineto, pri kies kaýzo li poste estas informita, ke temas pri la spirita estulo *Vero*, kiu vekas lian atenton pri la neceso fari korekton æe teksto de la suprecitita verko. En tiu domo li komencis akcepti vizitantojn, kiuj deziris konatiøi kun la aýtoro de *La Libro de la Spiritoj*. Dum la dua semestro de la jaro 1857, li okazigis seancojn æiumarde, por kiuj li kalkulis kun la helpo de la mediumino f-ino E. Dufaux kaj kun la æesto de eæ 30 personoj interesataj konatiøi kun la naskiøanta Spiritisma Doktrino.

La lanæo de la verko, kiu inaýguris la Spiritisman Doktrinon, okazis en la historia *Palais Royal*, situanta je mallonga distanco de la Muzeo Louvre. Tiu tradicia konstruaøo estis poparte starigata dum tri jarcentoj, æefe de membroj de la reøa familio de Orléans, sur tereno aparteninta al la Kardinalo Richelieu (v. *Spiritisma Revuo*, 2<sup>a</sup> trimestro 2004,



*Rue de la Grange Batelière - loøejo de S-rino Plainemaison (supre). Sidejo de la S.P.E.E. kaj loko kie Kardec elkarniøis (malsupre).*



p. 25-26). En la interno de la historia kaj mirindega komerca galerio *Palais Royal*, ekzistis la *E. Dentu, Libraire*, æ n<sup>o</sup> 13 de la *Galerie d'Orléans*. Tie Allan Kardec lanæis la verkon *La Libro de la Spiritoj*, en la sabata mateno de la 18<sup>a</sup> de Aprilo 1857. Tiam ekzistis sur tiu areo ia ligna strukturo kun vitritaj surfacoj. En la dependaĵoj de la *Palais Royal* Allan Kardec fondis la unuan spiritisman centron en la mondo, la Parizan Societon por Spiritismaj Studoj, kiu funkciis æiumarde en luita æambro, de la 1<sup>a</sup> de Aprilo 1858 ois la 1<sup>a</sup> de Aprilo 1859, æ la Galerio Valois (dekstra flanko de la *Palais*), kaj de la 1<sup>a</sup> de Aprilo 1859 ois la 1<sup>a</sup> de Aprilo 1860 en æambro de la restoracio Douix, æ la Galerio Montpensir (maldekstra flanko de la *Palais*).

Je kelkstrata distanco de la *Palais Royal* troviæas la *rue Sainte Anne*. En la numero 59 de æi tiu strato, æ la *Passage Sainte Anne*, en apartamento de la 2<sup>a</sup> etaøo, la Pariza Societo por Spiritismaj Studoj de post la 1<sup>a</sup> de Aprilo 1860 ekfunkciis proprasideje. Æi tiu loko centralizis la laboradon de la Kodiginto. En tiu apartamento, la 31<sup>an</sup> de Marto 1869, Kardec subite mortis pro rompiøo de aneyrismo, dum li akceptis librejan komizon. Lin tuj sukuris Aleksandro Delanne, lia granda amiko kaj ja najbaro. La familio Delanne loæis ne multajn metrojn de tie, æ la *Passage Choiseul*, orte kontinua al la fino

de la *Passage Sainte Anne*. Teretaøe troviæas la magazenoj, kaj en la interetaøo kaj 1<sup>a</sup> etaøo estas la loæejoj.

Konversacianta kun Canuto Abreu, Gabriel Delanne raportas, ke li rememoras la tempon kiam li, ankoraŭ infano, vizitadis la apartamenton de la Kodiginto: *Li min karesadis, kaj iuokaze li sidigis min sur siajn genuojn, æirkaybrakis min je la talio kaj antaydiris, ke mi fariøos granda servanto de Spiritismo. Mi fariøis ne øuste ia «servanto», sed mi fieras aserti, ke mi faris mian eblon, en la limoj de miaj fortoj, por servadi al la Doktrino en la kampo al mi difinita».*

Unu jaron post lia elkarniøo, la koro de Allan Kardec estis translokita el la Tombejo Montmartre al la historia *Cimetière du Père Lachaise*, en kiu estas la tomboj de multaj eminentaj personoj kaj de spiritismaj pioniroj kiel Pierre-Gaëtan Leymarie kaj Gabriel Delanne. La druida dolmeno estis inaŷgurita en la 31<sup>a</sup> de Marto 1870. La tombo estas æiam ornamita per freþaj floroj kaj konstante vizitata. Poste estis tie enterigita lia vidvino Amélie-Gabrielle Boudet. Mistikaj personoj el diversaj landoj, tien portantaj florojn, ordinare eldiras preøojn, kaj kelkaj eæ kutimas tuþi la maldekstran þultron de la busto de Kardec.

Dum antaŷnelonga vizito al tiu tombejo, en kompanio de Cláudia Bonmartin, ni konis la personon, kiu volontule æiutage prizorgas la tombojn de Kardec, Delanne kaj Leymarie: S-rinon Antoinette Bastide. Þi raportis, ke de antaŷ pli ol 20 jaroj þi purigas la tri tombojn kaj þanøas la florojn. Þi konas la librojn de Kardec kaj plenumadas tiun taskon kiel dankon pro la scioj, kiujn Spiritismo havigis al þi. Þi rakontis, ke



*Loæejo de Kardec en la rue des Martyrs nro 8 – 2<sup>a</sup> etaøo, en la fundo (supre). Rue Tiquetonne - loæejo de s-ro Roustan kaj de la mediumino, f-ino Japhet (malsupre).*



*Tiama ilustraĵo pri la vitra tegmento de la Galerie D'Orléans æe Palais Royal.*



Tiama ilustraĵo  
pri la  
Librejo Dentu  
(maldekstre) en  
la Galerie  
D'Orléans  
æ Palais Royal  
(dekstre).



Tombo de Pierre Gaëtan Leymarie.



Tombo de Kardec kaj lia edzino.

pi kontinuas saman laboron faratan dum preskaŭ 30 jaroj de iu jam elkarniøinta sinjorino, kiu sin deklaris bonfarita pro resaniøo.

La omaøoj al la Kodiginto fariøos kadre de la programo de la 4<sup>a</sup> Tutmonda Kongreso de Spiritismo, en la dependaøoj de la *Maison de la Mutualité* en la *rue Saint-Victor*, 24, maldekstraborde de la rivero Sena, proksime al la Katedralo *Notre Dame*, al la *Sorbonne* kaj al la loko kie laboris Pierre-

Gaëtan Leymarie, en sia Librejo en la *rue Saint-Jacques*, 42. Leymarie loøis en apartamento preskaŭ kontraŭ la librejo.

Tiun vojiron al tiuj lokoj, kiujn la spiritistoj konsideras historiaj, oni ne miskomprenu kiel kulton al la pasinteco kaj al la mortintoj. Temas ja pri valorigo de la memoro pri Spiritismo kaj de la rekono, ke la pli bona kulto montriøas nur tiam, kiam «vi klopodas por sekvi la bonajn ekzemplojn, kiujn ili donis al vi» (*La Libro de la Spiritoj*, demando 206). El tio fontas la oportuneco de la studoj kaj konsideroj pri la æefa temo de la kongreso okaze de la Ducentjara Datreveno: «Allan Kardec - Konstruanto de la Nova Erao por la Pliboniøo de la Homaro». 📖

### Bibliografio:

Audi, E. *Vida e Obra de Allan Kardec*. Niterói: Lachâtre, 1999.

Abreu, Canuto. Gabriel Delanne. *Revista da Sociedade Metapsíquica de São Paulo*, v. 1., p.28-31, 1936.

Kardec, A. *Obras Póstumas*. Rio de Janeiro: Federação Espírita Brasileira, 1964.

Pérouse de Montclos, J. M. *Paris. City of Art*. (Trad. A-P-E International). New York: The Vendome Press, Chapter X, 2003.

Wantuil, Z.; Thiesen, F. *Allan Kardec*. Volumes II e III. Rio de Janeiro: Federação Espírita Brasileira, 1980 e 1988.

**Antonio César Perri de Carvalho**  
[cesarperri@aol.com](mailto:cesarperri@aol.com)

Profesoro de Odontologio, Doktoro pri Sciencoj, spiritista redaktisto, aŭtoro kaj kunaŭtoro de pluraj libroj, inter kiuj «La Scienculoj kaj S-rino Piper» kaj «Inter Materio kaj Spirito». Sekretario de la Nacia Federacia Konsilio de la Brazila Spiritisma Federacio kaj asesoro de la Internacia Spiritisma Konsilio. Eksprezidanto de la Unuiøo de la Spiritismaj Societoj de la Ptato San-Paylo.

# La komenco de la Historio

E

n la jaro 1848, en la vilaĝeto Hydesville, Ŝtato Novjorko, Usono, loĝis John D. Fox kun sia edzino Margaret kaj du filinoj: — Margaretta, 15-jara, kaj Katie, 12-jara.

En la nokto de la 31<sup>a</sup> de Marto de tiu jaro la knabinoj ektimis pro fortaj frapoj sur la muroj de ilia dormoĉambro kaj enkuris en la ĉambron de siaj gepatroj.

S-ro John D. Fox eliris kaj rigardis ĉirkaŭ la domo, sed neniu estis tie. La frapado tamen daŭre ripetadis plu. Iom post iom la knabinoj konvinkitis, ke la frapanto ne estas danĝera, forpelis la timon kaj alparolis lin. Per interkonsentita nombro da frapoj li respondis la demandojn pri ciferoj — aŭo, nombro da infanoj, k.s. — ĉiam ĉuste. Oni proponis al li interkonsentitan abocon per frapoj, kaj li rakontis sian propran historion. Li estis kolportisto 31-jara, nomata Charles Rosma, kaj havis kvin infanojn: tri knabinojn kaj du knabojn. Antaŭ kvin jaroj oni murdis lin en tiu domo por rabi kvincent dolarojn, kiujn li tenis. Lian kadavron oni enterigis en la kelo de tiu domo.

La familio Fox kaj ties najbaroj fosis en la kelo por serĉi la kadavron, sed la loko estis marĉa kaj akvo kun koto inundis ĉiun fosadon. Oni devis forlasi tiun klopodadon, ne trovinte la kadavron.

La knabinoj forvojaĝis: Margaretta iris al Rochester, N. J., en la hejmo de sia edzinigita fratino S-rino Fish; Katie veturis al najbara urbo.

En ambaŭ lokoj la frapoj komenciĝis, kaj aliaj personoj konstatis, ke ankaj ili havas la povon ricevi tiajn inteligentajn frapojn. Tiuj provoj fariĝis epidemio en Usono kaj transsaltis la oceanojn kaj disvastiĝis en Anglujo, Francujo k. a. landoj tra la mondo.

Oni forte kalumniis la fratinojn Fox, sed malgraŭ tio la frapoj furoris tra la mondo kaj tiel naskiĝis Spiritismo.

Nur 56 jarojn pli poste, kiam la frapoj en Hydesville jam estis tute forgesitaj, iu okazintaĵo pravigis la historion de Charles Rosma.

La 23<sup>an</sup> de Novembro 1904, la «Boston Journal» publikigis

artikolon pri la eltrovo de homa skeleto en la kelo de ruinigita domo en Hydesville. La iama loĝejo de familio Fox estis nun forlasita ruinaĵo, kaj iuj knaboj, revenantaj el lernejo, tie haltis por ludi en la ruinoj kaj konstatis, ke en la kelo estis falinta interna muro, iam starigita paralele kun la ekstera, kaj inter tiuj du muroj kupis homa skeleto kaj fera kofro.

Tiuj estis la restaĵoj de Charles Rosma, murdita tie antaŭ 61 jaroj, fare de antaŭaj loĝantoj en tiu domo nun ruinigita.

La fosado en la kelo neniam trovis la kadavron, ĉar ĉi kupis post la interna muro de la kelo, dum oni fosis nur interne, supozante, ke tiu muro estis ekstera.

La asertoj de la mortinto estis do veraj, kaj similaj faktoj okazas ĉis nun en aliaj lokoj de la mondo. Spiritismo renaskiĝas ĉiam, ĉar ĉia fundamento estas naturaj faktoj, kiuj ĉiam ripetigas.

Nun ekzistas tre riĉa kaj bela mediumeca literaturo, kiu kreskas kun ĉiu tago.

Tiuj faktoj estas eternaj. Ties neperfekta observado naskis la malnovajn mitologiojn, religiojn, superstiĉojn; ilia pli detala studado en nia tempo estas la kreskanta vivo de Spiritismo.

Studante tiujn faktojn, Allan Kardec publikigis de 1857 ĝis 1869 tre interesajn librojn, el kiuj jam aperis la plej gravaj, nome «La Libro de la Spiritoj», «La Libro de la Mediumoj», «La Evangelio laŭ Spiritismo».<sup>2</sup>

Ĉar la faktoj nun nomataj spiritismaj ripetigas spontanee en ĉiuj lokoj kaj en ĉiuj tempoj, Spiritismo nepre varbos al si en la estonteco la tutan mondon, simile kiel ĉiuj aliaj veraĵoj apogataj sur faktoj. Ĉi ne estas ia religia sekto de iuj homoj, kiel tiom da aliaj. En la estonteco ĉi apartenos al ĉiuj.

Ĉiuj atakoj, kontraŭdiroj, persekutoj, kalumnioj estos vanaj kaj tiel ridindaj kiel la iama malkonsento pri la movoj de la Tero kaj pri ekzisto de antipodanoj.

Nur nescio fanatike neas sen antaŭa studado de la temo diskutata. ■

<sup>1</sup> Teksto presita en la fino de la esperantlingva verko *Kio estas Spiritismo?*, de Allan Kardec, eldonita de la Brazila Spiritisma Federacio.

<sup>2</sup> La Brazila Spiritisma Federacio jam eldonis la du ceterajn, kiuj kun la tri ĉi-supre menciitaj, konsistigas la tiel nomatan «Spiritisman Pentateykon».

Ismael Gomes Braga kaj L. C. Porto Carreiro Neto

## Allan Kardec kaj

## Spiritismo



**A**nkoraŭ hodiaŭ, multaj rilatigas la vorton *Spiritismo al diversaj praktikoj aŭ sintenoj, kaj tre malfacile troveblas, en enciklopedioj kaj vortaroj, ĉia ligo kun Allan Kardec. Spiritismo do por multaj ankoraŭ restas nekonata. Ĉu vi povus diri al ni: kiuj estis Allan Kardec?*

Allan Kardec, la eminenta Kodiginto de la Spiritisma Doktrino, estis Sendito de Jesuo por inaŭguri sur la Tero la regadon de la *Promesita Konsolanto*, kiu venis por restarigi la purecon de la doktrino, kiun la Kristo instruis kaj praktikis.

Posedante enviindan akademian kleracon, li estis pedagogo, verkisto kaj esploristo de la mediumaj fenomenoj, kiuj ekde 1852 invadis Eŭropon, ĉefe en Parizo. El tiuj fenomenoj li deduktis, per kriteria scienca observado, la elementojn filozofiajn, etik-moralajn kaj religiajn, kiuj konsistigas la Spiritisman Doktrinon.

Pli frue, ankoraŭ uzante la nomon Denizard Rivail, li skribis plurajn librojn pri edukado, kaj krome tradukis en la germanan lingvon la verkon *Telemako*, de Fénelon, kun aldono de personaj notoj, kio ricevis al li laŭdojn de lia majstro Pestalozzi. Al li ankaŭ estis donitaj multaj Diplomoj, inkluzive de la Akademio de Arrás.

Li havis ĉtalan harditecon, kun kiu li alfrontis neordinarajn malfacilaĵojn, tenadis severajn batalojn, venke elportis kalumniojn kaj persekutojn de siatempaj moralaj pigmeoj. Li malgrate estis konsiderata unu el la plej eminentaj francaj gramatikistoj en sia tempo.

Kiel spiritisto, li senlace laboradis ĉis la preskaŭ antaŭtempa morto, en la aĝo de 65 jaroj, kaj postlasis ne vulgaran heredaĵon el verkoj, kiel la fundamentaj Libroj pri Spiritismo, tiuj al ili komplementaj, la Spiritisma Revuo, kiun li fondis kaj direktis, kaj en kiu li artikolis de 1858 ĝis 1869, kiam li elkarniĝis.

Li edziĝis kun Amélie-Gabrielle Boudet, poetino, desegnistino kaj

modela edzino, do tre simila al S-rino Pestalozzi. Post la morto de sia edzo, kiel universala heredantino de liaj havaĵoj, ŝi donacis, por ilia konservado kaj por la daŭra disvastigado de Spiritismo, ĉiujn aytarajn rajtojn de la Spiritismaj Libroj de li verkitaj, redaktitaj kaj publikigitaj.

**2) Kia estas la graveco de la verko de Allan Kardec por la homaro?**

Ĉi estas elstara, ĉar nemalhavebla por la homaro de hieraŭ, de hodiaŭ kaj de morgaŭ, ĉar en ĉi troviĝas la informoj liverantaj la konadon pri la vivo, la kosmo, la origino kaj celo de ĉio ekzistanta, krom ankaŭ pri la celoj de la ekzistado de la Spirito.

Scienco eksplikanta ĉiujn fenomenojn, en kiuj ni estas envolvitaj, ĉi ankaŭ prezentas ian filozofion, donantan klarigojn pri la kaŭzoj de la estaĵo, de la destino, de la doloro.

Religio prezentanta senkomparan etik-moralon, ĉiaj fundamentoj havas radikojn en la Evangelio de Jesuo, kia Li ĉin praktikis kaj instruis.

Dank'al la verkoj de Allan Kardec elkrepuskiĝas nova mateno el lumo por definitive fordisigi la mallumojn de nesciado.

**3) Kiel la spirita mondo sekvis la laboron de la Kodiginto?**

Laŭ informoj de la Bonfarantaj Spiritoj, Allan Kardec estis ano de la skipo de *La Konsolanto*. Li reenkariniĝis en perfekta agordeco kun la Gvidantoj de la homaro, ke li povu kapti ilian penson kaj la gvidliniojn, kiujn li devis sekvi por al ni postlasi tiun senkomparan Verkon, nome la Spiritisman Doktrinon, en tia formo, ke ĉi povu tiel supervivi ĉiujn sociajn moralajn malfeliĝegojn, kiel ankaŭ rekte rigardi ĉiujn konkerojn de la Scienco kaj de la Tekniko kaj tiel resti ĉiam aktuala.

Neniu el liaj aktivecoj restis sen apogo de la



**Divaldo Pereira Franco**, emerita instruisto. Kune kun sia kuzo Nilson de Souza Pereira, li fondis, en la urbo Salvadoro-BA, la institucion Domo de la Vojo, kie ricevis ĉirmon kaj edukadon pli ol 600 infanoj loĝantaj en la reĝimo de anstataŭaj hejmoj. Spiritista oratoro kaj mediumo, li faris pli ol mil prelegojn en 54 landoj, psikografie skribis ĉirkaŭ 200 spiritismajn librojn, el kiuj vendiĝis 7,5 milionoj da ekzempleroj, tradukitajn en 13 idiomojn.

Parolante pri Spiritismo, li elmontras entuziasmon, sangvinon kaj saĝon. Kun tia provizo li sendube elstaras kiel la plej granda disvastiganto de la Spiritisma Doktrino en la mondo.



respektigindaj Gvidantoj, kiuj ĉiam lin akompanis, inspiris kaj kondukis en la ellaborado de la spiritisma idearo.

4) En ĉi tiu jaro 2004, la Spiritisma Movado memorfestas la ducentjara natevenon de naskiĝo de Allan Kardec, la Kodiginto de la Spiritisma Doktrino. Kiajn konsiderojn ni faru en ĉi tiu rilato?

Ĉe la memorfestado de la ducentjara nateveno

de naskiĝo de la klera majstro Allan Kardec, ni konsideras la grandecon de la devoj sidantaj sur niaj ĉultraj, kiel homoj penantaj fariĝi spiritistoj. Ni penu ne malhonoru lian memoron per nia konduto krom ankaŭ daŭre laboradi por lumigi konsciencojn, kiel li faris, per ĉusta disvastigo de la doktrinaj principoj, ĉefe per ilia ĉiutaga praktikado.

La homaro stertoras, plimultiĝas la doloroj, la homo frenezas. La Scienco kaj la Tekniko, kiuj havigis multan komforton kaj rimedojn por la evoluado socia, morala, intelekta sur la Tero, ne sukcesis meti finon al la mizeroj en la ekonomio kaj en la konduto, kaj nek al la viro nek al la virino havigis pacon kaj feliĉon.

Apartenas al Spiritismo la tasko klerigi kaj prirespondigi la homon, por ke li povu trovi sian lokon sub la Suno kun ĉojo pri la vivo kaj kuraĝo por elbatali la personan renoviĝon.

Nur per la klaraj kaj nesupereblaj respondoj de Spiritismo ni povos ĉui la spiritan plenecon kaj tiel liberiĝi el la krudeco karakterizanta al ni la vivon.


Ja konsiderojn de tia grandeco ni devas fari al ni en la nuna kaj en la estonta tempo.

5) Ni ja komprenas la rilaton inter la Spiritisma Mesaĉo kaj la Mesaĉo de la Evangelio. Kia estus la rilato inter Jesuo kaj Allan Kardec?

Se Jesuo ne estus antaŭe veninta, ni poste ne havus Spiritismon.

Ĉar la Majstro sciis, ke Lia mesaĉo estos misformita de la homaj pasioj, ke Liaj instruoj estos aliigitaj kaj konformigitaj al tujcelismaj interesoj de la homoj, Li tiam promesis, ke Li *preĝos al la Patro kaj sendos la Konsolanton, ke ĉi tiu rememorigu liajn lecionojn kaj instruu novajn aferojn, kiujn oni en Sia tempo ne povus kompreni*. Kaj ĉuste tio nun okazas.

La Spiritisma Mesaĉo estas do ia aktualigo de la Evangelio de Jesuo, kaj Allan Kardec estas tiu bonega disĉiplo, kiu imitis la Majstron, aktualigante



Liajn lecionojn kaj oferante sian vivon al la disvastigo de Liaj liberigaj instruoj.

La saĉa disĉiplo komprenas la senkomparan Majstron kaj fidele sekvas Liajn paĉojn, tiel instruante al la mondo kiel la homo povas esti feliĉa.

6) Vi iam asertis, ke Jesuo utiligos Spiritismon por aliigi la surterajn pejaĉojn. Dum viaj multaj vojaĉoj tra la 5 kontinentoj, ĉu vi konstatas tiun aliĉon? Aŭ kiel ĉi iam okazos?

Sen ia dubo, Spiritismo ĉustatempe alvenas por starigi la *regnon de Dio* sur la Tero, malgraŭ la malfacilaĉoj, kiujn ĉi spertas ĉe en la sino

mem de la spiritisma movado, kaj tio ja estas memkomprenebla.

Kie mi iradas, ĉu jam trovante Spiritismon, ĉu ĉin diskonigante, mi tuj konstatas la ĉanĉon, kiun la doktrino estigas en la vivo de la personoj, kiujn ĉi plibonigas, kondukante al konduto konforma al sia moralo, tiel havigante dignon al la homo. Estas kompreneble, ke iu Doktrino ankoraŭ nova sur la Tero - nur 147-jara post la publikigo de *La Libro de la Spiritoj* - ankoraŭ restas iagrade nekonata kaj nur nun estas pli bone disvastigata dank'al la amaskomunikilaj rimedoj kaj la malkresko de la kultura, religia kaj scienca netoleremo. Ĉi tiamaniere sukcesas penetri la unuopajn mensojn kaj korojn por poste dissemiĉi tra la tuta socio kiel harmonia tutaĉo.

Kiam la homaj grupoj agnoskos sian senmortecon, la reenkarĉiĉon, la komunikĉon inter la tiel nomataj mortintoj kaj vivantoj, la plurecon de la loĉataj mondoj kaj la superegan valoron de amo, tiam nepre aliĉos la loĉoj, la kondutoj kaj la celoj de la socio.

7) Ĉu la estontaj generacioj pli konscie akceptos la mision de Allan Kardec kaj tiun de Spiritismo, kiel signojn de ia nova epoko por la homaro? Kion la Bonfarantaj Spiritoj povas diri al ni pri tio?

Niaj spiritaj Mentoroj informas, ke Allan Kardec estas multe pli studata, konata, atentata hodiaŭ, ol en la tempo, kiam li estis inter ni en sia fizika korpo.

Ili asertas, ke ĉiuj, kiuj ekkonas la Doktrinon, plibonigas sian konduton kaj starigas al si celojn kun espero al la estonteco, tiel metante la fundamentojn de la Erao de la Senmorta Spirito, kiu komenciĉis en la 18<sup>a</sup> de Aprilo 1857.

Allan Kardec sendube estos konata kiel la nobla naviganto, kiu alfrontante la faŭkantajn oceanojn de la tumultaj tempoj de la klereco, ĉi tiun triumfe kondukis al la plaĉoj de la paco kaj feliĉo de ĉiuj dezirataj.

Praktiki la Spiritisman Doktrinon tia, kia li ĉin donis al ni, estas devo, kiun ni ne povas prokrasti, por elmontri la grandecon, kiun ĉi havas dank' al sia nobla Kodiginto. ■

*Intervjuo donita de Divaldo Pereira Franco al Luis Hu Rivas por la Spiritisma Revuo.*



# Kardec kaj Napoleono

*Mesaøo represita el la libro «Leteroj kaj Kronikoj», psikografie skribita de mediuo Francisco Cândido Xavier, diktita de la Spirito Frato X (\*) kaj publikigita de la Brazila Spiritisma Federacio.*

# T

uj post la 18<sup>a</sup> de Brumero (9<sup>a</sup> de Novembro 1799), kiam Napoleono fariøis la Unua Konsulo de la Franca Respubliko, okazis en la nokto de la 31<sup>a</sup> de Decembro 1799, en la sino de la latineco, en la Supraj Regionoj, granda kunsido de saøaj kaj bonvolaj Spiritoj por soleni la signifoplenan komencon de nova jarcento.

Antikvaj eminentuloj de la imperia Romo, pontifikoj kaj militistoj el Gallio, famuloj el Hispanio tie kunvenis en atendo de tiu grava evento.

Legioj de la Cezaroj kun siaj standardoj, falangoj el gallaj militistoj kaj aroj da pioniroj de la hispana evoluado, kune kun pluraj reprezentantoj de la Amerikoj, formis simbolajn liniojn en reliefa pozicio.

Sed ne nur la latinoj reprezentiois en la grava kunveno. Eminentaj grekoj, elvokantaj la interparolojn en la glora Akropolo, famaj izraelidoj, memorigantaj pri la Jerusalema Templo, slavaj kaj germanaj delegitaroj, grandaj figuroj el Anglio, æinaj saøuloj, hindaj filozofoj, budhismaj teologoj, oferantoj al la olimpiaj dioj, renomaj sacerdotoj de la Roma Eklezio kaj sekvantoj de Mohamedo tie æeestis kvazaŭ por vasta elvoko de fortoj de la scienco kaj kulturo de la homaro.

En tiu unuiøo de brilaj delegitaroj, tie paradantaj per sia tuta reprezenta lumeco, montriøis malnovaj laborantoj por la progreso, kiuj

revenos al la enkorpa luktado, aŭ en øi partoprenos de proksime, por kontraŭbatali nesciadan kaj mizeron æe laborplena preparado de la nova epoko de frateco kaj lumo.

En tiu splenda spektaklo de la Supera Spirita Mondo, partoprenis, kun la brilego de siaj animoj, Sokrato, Platono, Aristotelo, Apolonio el Tiano, Origeno, Hipokrato, Aŭgusteno, Fénelon, Giordano Bruno, Tomaso la Akvinano, Sankta Ludoviko el Francio, Vincenzo de Paŭlo, Johanino Dark, Terezo el Avila, Katerino el Sieno, Bossuet, Spinozo, Erasmo, Miltono, Kristoforo Kolumbo, Gutenbergo, Galilejo, Paskalo, Swedenborg kaj Danto Aligiero, por nur mencii kelkajn heroojn kaj paladinojn de la surtera progreso, kaj, en malpli brila pozicio en tiu belega loko, troviøis malaltrangaj laborantoj, inkluzive de multaj el la gilotinitoj dum la Revolucio, kiel Ludoviko XVI, Maria Antonieta, Robespiero, Dantono, S-rino Roland, Andreo Chenier, Bailly, Kamilo Desmoulins kaj eminentaj figuroj kiel Voltaire kaj Rousseau.

Post la mallonga parolo de iuj eminentaj gvidantoj, nevideblaj klarionoj eksonis el la korpaj regionoj, kaj en momento, el la sino de la nokto vualanta la ciklopan korpon de la eŭropa mondo eliois, eskortata de lumspiritaj kurieroj, malgranda procesio el ombroj, kiuj aspektis strangaj kaj



*Laŭ transmondaj tradicioj, Napoleono Bonaparto (1769-1821), imperiestro de la francoj (1804-1814 kaj 1815), estis vokita en gravan kunsidon de Saøaj Spiritoj en la komenco de la jarcento XIX.*

panceliaj en kontrasto kun la intensega lumradiado de la festa palaco.

Tio estis grupo da ankoraŭ enkarniigitaj animoj, kiuj, devigite de la Āiela Organizo, supreniris en la spiritan mondon por la recertigo de faritaj sindevontigoj.

En la fronto venis Napoleono, koncentrante al si la atenton de la alestantoj. Tio ja estis la granda korsikano kun sia kutimaj vestoj kaj karakteriza ĉapelo.

Akceptite de diversaj figuroj el la antikva Romo, kiuj tuj pretis por disponigi al li apogon kaj helpon, la venkinto apud Rivoli ekokupis radiluman seĝon jam antaŭe preparitan por li.

Inter tiuj, kiuj lin akompanis en la kurioza vojaĝo, troviĝis respektindaj surteraj gravuloj, kiel Betoveno, Ampero, Fultono, Farado, Goeto, Johano Daltono, Pestalozo, Pio VII, krom multaj aliaj ĉampionoj de prospero kaj sendependeco en la mondo.

Timemaj en la spirita envolvado, kiu ilin katenis al la surtera karno, preskaŭ ĉiuj estis banataj en larmoj de oĝo kaj emocio.

Sed la unua Konsulo de Francio havis la okulojn malsekaj, malgraŭ la ekstrema paleco de sia vizaĝo. Ricevante laŭdojn de pluraj legioj, li nur respondis per diskretaj gestoj, kiam jen la klarionoj alimaniere eksonis, kvazaŭ ili supren ekflugus direkte al la nemezurebla senfino...

la lumvojo, simile al levponto, subite etendiĝis el la Āielo kaj ligiĝis al la mireginda kastelo, ebligante transiron al multe da brilegantaj steloj.

Sed tiuj astroj, tujpinte la delikatan grundon, transformiĝis en homajn estulojn aŭreolitajn de ĉiela heleco.


El ĉiuj, unu tamen distingiĝis per sia supereco kaj beleco. Splenda tiaro brilegis sur lia kapo, kvazaŭ aŭreolante per benoj lian grandaniman rigardon plenan de allogo kaj doloro. En la dekstra mano li tenis oran sceptron ornamitan per sublimaj scintiloj...

Nevideblaj muzikantoj, pere de leĝere traflugantaj zefiroj, ekaŭdigis senvortan, hosanan kanton.

La amaso elmontris profundan riverencon, kaj multaj el la saŭloj kaj militistoj, artistoj kaj pensuloj genuiĝis, dum ĉiuj flagoj de la standardistoj senbrue



*En Novembro 1799, Napoleono sin mem kronas antaŭ la Papo Pio VII kaj fariĝas la Unua Konsulo de la Franca Respubliko.*



malleviĝis kiel atesto pri respekto.

Jen tiam la granda korsikano ekploris, stariĝis kaj malfacile paŝis direkte al la kuriero portanta la oran bastonon, antaŭ kiu li ekgeniŝis.

La ĉiela kuriero kun senafekta rideto lin tuj levis kaj provis lin brakumi, kiam jen paŝnis, ke la Āielo malfermiĝas antaŭ ĉiuj kaj la voĉo, energia kaj dolĉa, forta kiel ventego kaj velureca kiel nekonata fontomuziko, ekkriis al Napoleono, kiu paŝnis elektrizita samtempe de timego kaj oĝo:

— Frato kaj Amiko, aŝskultu la Veron, kiu parolas al vi en mia spirito! Jen vi staras antaŭ la apostolo de la fido, kiu, sub la egido de la Kristo, malfermos al la turmentata Tero novan ciklon de sciado...

Hieraŭ kiel Cezaro, hodiaŭ kiel gvidanto, oferu vian kulton de respekto al la pontifiko de la lumo! Rekonfirmu, antaŭ la Evangelio, la sindevontigon helpi ties renaskiĝantan verkon!...

Āi tie kolektiĝas kun ni laborantoj de ĉiuj epokoj. Patriotoj el Romo kaj Gallio, generaloj kaj soldatoj, kiuj vin sekvis en la bataloj apud Farsalo, Tapso kaj Mondo. Militintoj en la bataloj apud Gergovio kaj Alezio ĉi tie vin revidas kun simpatio kaj espero... Iam, sur absolutisma trono, vi pretendis esti ido de la



dioj, por superpotenci la Teron kaj ekstermi la malamikojn... Sed nun la Superega Sinjoro donis al vi, kiel lulilon, ian izolitan insulon, por ke vi ne forgesu la homan malgrandecon. Li ankaŭ ordonis, ke vi revenu en la sinon de tiu popolo, kiun vi iam humiligis kaj malpatis, por ke al ĉi vi certigu ĉian gigantan mision ĉe la homaro, en la nun komenciĝanta jarcento.

La Ĉiela Saĝeco starigis vin kiel stiriston de la ordo sur la sanga maro de la Revolucio; ne forgesu do la mandaton, por kiu vi estis elektita.

Ne kredu, ke la venkoj, kiuj vin kondukis al la konsuleco, estas ekskluzive ĉulditaj al via militista kaj politika genio. La volo de la Sinjoro esprimiĝas en la cirkonstancoj de la vivo. Pleniĝu de kuraĝo por regi sen ambicio kaj administri sen malamo. Helpu vin per preĝado kaj humileco, por ne fali en la abismojn de tiraneco kaj perforto!...

Ĉar vi ricevis la komision solidigi la pacon kaj la sekurecon necesajn al la sukceso de la abnegacia apostolo, kiu malfermos la novan epokon, tial vin celos la tentoj de la potencado.

Ne lasu vin fascini de vantamo, kiu provos meti kronon sur vian frunton... Memoru, ke la suferado de la franca popolo, persekutata de la malfeliĝegoj de interna milito, estas la prezo de la homa libereco, kiun vi devas defendi ĉisinofero. Ne makulu vin per sklavigo de malfortaj kaj opresataj popoloj, nek malpurigu la plenumadon de viaj devoj per la koto de ekskluzivemo kaj veno!...

Memoru, ke, pro oboe al trudoj de la pasinteco, vi renaskiĝis por certigi la spiritan servadon de la disĉiplo de Jesuo, kiu nun revenas al la surtera vivo, kaj profitu la okazon por sanktigi la sublimajn principojn de boneco kaj pardono, servado kaj frateco, de la Dia Paŝado, kiu aŝdas nin en sia glora trono de saĝo kaj amo!

Se vi tenos viajn promesojn, la elplenumo de via misio rikoltigos al vi la dankon de la posteuloj, kaj vi ascendas al pli altaj horizontoj de la vivo. Sed se vi malpatis viajn prirespondojn, ombraj afliktoj amasiĝos super viaj horoj, kiuj aliĝos en mallumajn ĉemojn en vasta dezerto...

En la nova jarcento, ni komencos prepari la trian jarmilon de Kristanismo sur la Tero.

Novaj konceptoj de libereco aperos en la homaro, la Scienco altiĝos ĉis plej altaj kulminoj,

la kleraj nacioj por ĉiam forigos sklavecon kaj fikomercadon pri liberaj homoj, kaj la religio malligos la pensokatenojn, kiuj ĉis nun enkarcerigas la plej noblajn aspiriĝojn de la animo en senapelacia infero!...


Konfidante do al via brava spirito la politikan regadon super la novaj eventoj, ni al vi esprimas la deziron, ke la Sinjoro vin benu!...


Kantoj de ĉojo kaj espero anoncis en la ĉielo la alvenon de la jarcento XIX, kaj, dum la Spirito de Vero, sekvata de multaj splendaj kohortoj, revenis al la Supro, la neforgesebla kunsidantaro disiĝis...

La apostolo, nome la estonta Allan Kardec, tenante Napoleonon en la brakoj, premis lin al sia brusto kaj lin amplene kondukis ĉis lia lito, kie li rekuniĝis al sia karna korpo.

En la 3<sup>a</sup> de Oktobro 1804, la kuriero de la renovigo renaskiĝis ĉe benata hejmo en Liono, sed la Unua Konsulo de la Franca Respubliko, tuj liberiĝinte el la bonfara kaj protekta influo de la Spirito de Allan Kardec kaj ties kunlaborantoj, kiuj iom post iom

revenadis en la karnon kun konfido kaj optimismo, sin ornamis per la purpuro de la ordonpovo kaj, ebria de la potenco, sin proklamis Imperiestro en la 18<sup>a</sup> de Majo 1804, ordonante al Pio VII veni Parizon por mem lin kroni.

Napoleono, aliigante ĉielajn donojn en sangajn aventurojn, estis metita, laŭ ordono de la Supro, en rebonigan izolon ĉe Sankta Helena, kie li atendadis la morton, dum Allan Kardec, kaŝante sian propran grandecon en la humila pozicio de instruisto kaj multfoje spertante ĉagrenojn kaj elreviĝojn kiel simpla popolano, komplete plenumis sian dian mision sur la Tero, per kiu li inaŝguris la kristan-spiritisman epokon, kiu iom post iom estos rigardata en ĉiuj regionoj de la planedo kiel ia subluma renesanco de lumo por la tuta mondo. 



*Julio Cezaro (100 a.K.-44 a.K.),  
fondinto de la plej grava imperio en  
la Antikveco, genia militisto kaj  
talenta politikisto, revenis al la  
enkorpa vivo kiel Napoleono  
Bonaparte kun la komisiono helpi por  
la verko de Kardec.*



(\* Frato X, pseŝdonimo adoptita de Humberto de Campos (1886-1934), gazetartikolisto, brazila literato, transmonda aŝtoro de diversaj spiritismaj libroj.

# Allan Kardec kaj la mil spiritismaj Societoj en la mondo kun kiuj li korespondadis en 1864...

**AE**

iam estis diskutoveka la informo de Allan Kardec (1804-1869), kiu troviĝas en La Evangelio laŭ Spiritismo (la unua eldono, titolita Imitado de Evangelio, jam enhavis tiun informon), 1864, Enkonduko,

numero II, ke li jam korespondadis kun ĉirkaŭ mil Spiritismaj Centroj en la tuta mondo.

Multaj opiniis, ke Allan Kardec troigis. Profitante la okazon, ke en 2004 oni memorfestas la ducentjaran datrevenon de naskiĝo de la Kodiginto, ni prezentas al la amikaj legantoj la rezulton el esploro, kiun ni faris kun la helpo de aro da spiritistaj kamaradoj, pri la nombro da lokoj (menciitaj en ĉiuj libroj de la Kodigo kaj de la Spiritisma Revuo), kie en la tempo de Allan Kardec, t.e., de 1858 ĝis 1869, ekzistis spiritisma aktivado. Ni mencias lokon aperintan en la libroj de la Kodigo de Allan Kardec nur en la okazo se ĝi ne estas menciita en la Spiritisma Revuo.

La inventaro ankaŭ servis por ĝusta taksado de tiama disvastiĝo de Spiritismo en la mondo. La rezultato montris, ke post dek du jaroj la Spiritisma Doktrino jam estis disvastiĝinta tra DUCENT SESDEK OK URBOJ AŬ LOKOJ EN 37 LANDOJ (la ĉefaj en kvar kontinentoj - Eŭropo, Afriko, Azio kaj Amerikoj, el kiuj pli ol duono troviĝas en Francio). Tio montris la absolutan ĝustecon de la informo de la Kodiginto, ke li korespondadis kun mil spiritismaj societoj.

Cetere nur tion oni povus atendi de li, kies karaktero, seriozeco kaj temperamento tute ne akordigeblus kun eraroj de tia speco.


Necesas tamen kelkaj klarigoj:

1) se ni supozas, ke en ĉiu loko eble troviĝis tri aŭ kvar spiritismaj societoj, ili do kalkuliĝus al ĉe pli ol mil;

2) memkompreneble en iuj lokoj devis ekzisti nur unu spiritisma centro (aŭ ĉe neniu, aŭ ununura interesato, unu korespondanto de la Revuo, unu ano de la Pariza Societo, aŭ tie okazis diskonigitaj fenomenoj, aŭ forta socia aŭ religia persekutado malgraŭ neekzisto de spiritisma societo).

Kontraŭpeze, en aliaj lokoj estis ne nur du aŭ tri centroj, sed ja multe pli, ja dekoj da ili. Kiel ekzemplon, ni mencias la

Departementon de Albi/Francio, kie estis dek du en 1863 (v. en la Spiritisma Revuo, Aprilo/1863), krom ankaŭ Parizo, kie funkciis dekoj da centroj.

Ekestas do ia averaĝa kompenso, kaj oni atingas la nombron de mil spiritismaj centroj. Krom la inventaro de lokoj, ankaŭ necesis alia esploro cele al starigo de ilia geografia situo (en kiu lando kaj kontinento, se estis nombrano, ktp, ĉar en pli ol unu lando estis samnomaj lokoj). Kiel gravan registron ni do, la unuan fojon en la historio de Spiritismo, prezentas referencan inventaron, kun pli ol kvincent mencioj, de ĉiuj lokoj, en kiuj Spiritismo faris siajn unuajn paŝojn. Ĉi tiu laboro ne devas esti rigardata kiel definitiva sed ja kiel komenciĝo de esploroj kaj eltrovoj. 

*Washington Luiz Nogueira Fernandes*  
[washingtonfernandes@terra.com.br](mailto:washingtonfernandes@terra.com.br)



## Listo de la 37 landoj, kie en la tempo de Kardec ekzistis spiritisma aktivado

|   |  |   |
|---|--|---|
|  <b>AFRIKO</b><br>MALGRANDA<br>AFRIKA URBO<br>ARGELIO<br>EGIPTIO<br>GVINEO-BISAŬO,<br>MAYRICIO.<br>(5 landoj kaj 14 lokoj) |  <b>PERUO</b><br>(8 landoj kaj 23 lokoj)  |  <b>BELGIO</b><br>DANIO<br>SKOTLANDO<br>HISPANIO<br>FRANCIO (163 LOKOJ)<br>GREKIO<br>NEDERLANDO<br>ANGLIO<br>ITALIO<br>POLLANDO<br>PORTUGALIO<br>PRUSIO<br>RUSIO<br>SVEDIO<br>SVISIO<br>UKRANIO<br>(18 landoj kaj 222 lokoj) |
|  <b>AMERIKOJ</b><br>BRAZILIO<br>KANADO<br>KOLOMBIO<br>KUBO<br>USONO<br>FRANCA GUJANO<br>MEKSIKO                            |  <b>AZIO</b><br>EKSTREMORIENTA<br>AZIO<br>ĈINIO<br>KORĈINIO<br>(HINDOĈINIO)<br>SIRIO<br>TURKIO<br>ISRAELO<br>(6 landoj kaj 9 lokoj) |  <b>EŬROPO</b><br>GERMANIO<br>AŬSTRIO  |

\*Legu la kompletan, detalan liston en la retpaĝo de la Internacia Spiritisma Konsilio: [www.spiritist.org/spiritismarevuo](http://www.spiritist.org/spiritismarevuo)



## BRAZILO

## EFIKOJ DE LA VERKO DE KARDEC EN BRAZILO

La Ducentjara Naskiøtago de Allan Kardec (1804-2004) kaj la preparoj por la 4<sup>a</sup> Tutmonda Kongreso de Spiritismo, turnas nian atenton sur kelkajn faktojn kaj informojn pri la efikoj de la Verko de Allan Kardec en Brazilo:

1) **Nombro da spiritistoj en Brazilo:** 2,3 milionoj (donitaøoj el la lasta Censo). Oni taksas je 30 milionoj la nombron da simpatisantoj;

2) **Nombro da Spiritismaj Institucioj en Brazilo:** 10 mil, oficiale registritaj æ la Brazila Spiritisma Federacio (BSF) ;

3) **Socihelpa servo:** proksimume 10 mil spiritismaj institucioj kun socihelpaj kaj homvalorigaj entreprenoj (hospitaloj, vartejoj, orfejoj, rifuøejoj kaj spiritismaj societoj) agantaj en la komunumoj kaj favorantaj la socianiøon. Nur unu el tiuj institucioj, *Lar Fabiano de Cristo*, æiujare kaj en nacia skalo, subtenas 100 mil familiojn en stato de ekstrema senhaveco. Æi tiun laboron UNESKO rekomendis, kiel modelon, al disvolviøantaj landoj. Inter la bonfaraj institucioj estas 76 spiritismaj hospitaloj;

4) **Spiritismaj libroj:** ekzistas 80 spiritismaj eldonejoj en la lando, subtenantaj la eldonadon de 4 mil verkoj je proksimume totala kvanto de 60



*La Brazila Spiritisma Federacio (BSF) eldonis 10 milionojn da ekzempleroj de libroj de Allan Kardec, kaj lastatempe eldonis, en la portugala lingvo, la kolekton de la "Spiritisma Revuo", de 1858-1869.*

milionoj da publikigitaj ekzempleroj. Nur la BSF eldonas pli ol 400 verkojn kaj jam publikigis 10 milionojn da ekzempleroj de libroj de Kardec, 15 milionojn de Francisco Cândido Xavier kaj 13 milionojn de diversaj aýtoroj, je la totala nombro de æirkaý 39 milionoj da libroj. Laý esploro farita de la Nacia Sindikato de Libroeldonistoj æ vizitantoj de la Bienalo de Rio de Janeiro en 2003, la spiritisma libro estis la dua plej seræata kategorio;

5) **Publika rekono:** en centoj da brazilaj urboj estas publikaj lokoj, kiel placoj kaj stratoj, kun la nomo Allan Kardec. Spiritismaj æefaktivuloj en Brazilo estis distingitaj per centoj da omaøoj pro socihelpaj agadoj plenumataj en spiritismaj institucioj, dank'al iniciatoj de la Nacia Deputitaro kaj de la Ptataj kaj Urbaj Parlamentoj. Magistrataj Konsilioj kaj Leøofaraj Asembleoj promulgis leøojn, kiuj starigis la 18<sup>an</sup> de Aprilo kiel «Tagon de la Spiritisma Libro» pro tio, ke Allan Kardec lanæis *La Libron de la Spiritoj* - la inaýguran verkon de la Spiritisma Doktrino - en la 18<sup>a</sup> de Aprilo 1857, en Parizo. Fonto: (Brazila Spiritisma Federacio)

# KOMENCU PER LA KOMENCO

KONATIĜU KUN SPIRITISMO LEGANTE LA BAZAJN  
VERKOJN DE ALLAN KARDEC:

LA LIBRO DE LA SPIRITOJ (1857)  
LA LIBRO DE LA MEDIUMOJ (1861)  
LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO (1864)  
LA ĈIELO KAJ LA INFERO (1865)  
LA GENEZO (1868)



LEGU LA VERKOJN DE KARDEC



## 4<sup>a</sup> TUTMONDA KONGRESO DE SPIRITISMO

### KONGRESO OMAØOS LA DUCENTJARIØEN DE KARDEC

La memorfestoj de la Ducentjariøo de Allan Kardec atingos sian kulminon en la 4<sup>a</sup> Tutmonda Kongreso de Spiritismo, okazonta de la 2<sup>a</sup> øis la 5<sup>a</sup> de Oktobro 2004, en Parizo. La eventon ayspicias la Internacia Spiritisma Konsilio, organizas la Franca kaj Franclingva Spiritisma Unuiøo, kaj plenumas la Asocio Kardec.

La Kongreso havos lokon en la Maison de la Mutualité (rue St. Victor, 24), en la urbocentro, proksima al la Sorbonne kaj facile alirebla, je unu stratangula distanco de la metrostacio Maubert-Mutualité.

La programo, kies æefa temo estas «Allan Kardec – Fondinto de Nova Erao por Rebonigo de la Homaro», elvolviøos per rondatablaj debatoj pri la kvin æefaj verkoj de la Kodiginto, pri la «Evoluo de la Spiritisma Movado» kaj «Disvastigo de la Spiritisma Doktrino», kaj la inaýguran kaj ferman paroladojn faros respektive José Raul Teixeira kaj Divaldo Pereira Franco.

Por partopreni en la rondatablaj konferencoj estas konfirmata la æeesto de jenaj personoj: **Argentino:** Juan Antonio Durante; **Belgio:** Jean-Paul Evrard; **Brazilo:** Alberto Almeida, Alexandre Sech, Altivo Ferreira, Antônio César Perri de Carvalho, César Soares dos Reis, Décio Iandoli Júnior, Eduardo Carvalho Monteiro, Marlene Rossi Severino Nobre, Nestor João Masotti, Sérgio Felipe de Oliveira; **Kanado:** Leo Gaudet; **Kolombio:** Fábio Villarraga; **Hispanio:** Salvador Martin; **Usono:** Sonia de Quateli Doi, Vanessa Anseloni; **Franco:** Charles Kempf, Jérémie Philippe, Joel Ury, Mickael Buffet, Michel Ponsardin, Roger Perez; **Gvatemalo:** Edwin Bravo; **Italio:** Domenico Romagnolo; **Panamo:** Maria de la Gracia Simões; **Portugaliao:** Arnaldo Costeira y Porfirio Lago.

Funkcios lingvoservo por simultana interpretado en la franca, portugala, hispana, angla kaj esperanto; du ekspozicioj, unu pri la Vivo kaj Verko de Allan Kardec, alia pri la Spiritisma Movado en la Mondo; krom ankaý unu internacia spiritisma libroservo.



*Maison de la Mutualité  
Fronto (supre)  
Aliro al la Kongresejo (malsupre)*



Partoprenu! Kunlaboru por la disvastigo de la Spiritisma Doktrino en æiuj landoj. Informoj kaj kompleta programo:

ISK - telefonnumero (0055) (61-322 3024).

[www.spiritist.org](http://www.spiritist.org) [www.spiritisme.org](http://www.spiritisme.org)

[union.spirite@wanadoo.fr](mailto:union.spirite@wanadoo.fr)

[spiritist@spiritist.org](mailto:spiritist@spiritist.org)



*Maison de la  
Mutualité,  
Ayditorio  
(Vido el la  
Balkonoj)*



# MEMBROJ DE ISK



## 1-ANGOLO

Sociedade Espirita Allan Kardec de Angola  
Rua Amilcar Cabral, 29 - 4°. B  
LUANDA - ANGOLA  
Tel/Fax: 00 2 442 334 030 (residencial)  
seakaangola@hotmail.com

## 2-ARGENTINO

Confederación Espiritista Argentina  
Sánchez de Bustamante, 463  
1173 - BUENOS AIRES - ARGENTINA  
Tel/Fax: 00 54 11 4862-63 14  
ceaespiritista@ciudad.com.ar

## 3-BELGIO

Union Spirite Belge  
43 Rue Maghin,  
B-4000 LIEGE - BELGIQUE (BÉLGICA)  
Tel: 00 32 (04) 227-6076  
http://users.skynet.be/usb  
e-mail: usb@skynet.be

## 4-BOLIVIO

FEBOL - Federación Espirita Boliviana  
Calle Libertad, 382 entre Seoane y Buenos Aires  
Casilla de Correo 6756  
SANTA CRUZ DE LA SIERRA, BOLÍVIA  
Tel: 00 59 133363998 - 00 591 3 337.6060  
www.spiritist.org/bolivia/  
e-mail: cristinaeduardo@cotas.com.bo

## 5-BRAZILIO

Federação Espirita Brasileira  
Av. L2 Norte - Quadra 603 - Conj. F - Asa Norte  
70830-030 - BRASÍLIA - DF - BRASIL  
Tel: 00 55 (0) 61 321-1767  
www.febnet.org.br  
febnet@febnet.org.br

## 6-ĈILIO

Centro de Estudios Espiritas Buena Nueva  
Calle Nelson, 1721 - Ñuñoa - Santiago.  
SANTIAGO - CHILE  
Tel: 056 2 4757560.  
caraguita@123mail.cl

## 7-KOLOMBIO

Confederación Espiritista Colombiana  
Calle 22 A Sur No. 9-71/81  
BOGOTÁ-COLOMBIA  
Tel/Fax: 00 57 1 287-0107  
www.geocities.com/confecol  
confecol@yahoo.com

## 8- SALVADORO

Federación Espirita de El Salvador  
39 Calle Poniente No. 579 y 571, Barrio Belén  
SAN SALVADOR - EL SALVADOR  
América Central  
Tel. 00 (503) 502 2596  
caledraelmestas@hotmail.com

## 9-HISPANIO

Federación Espirita Española  
C/Dr. Sirvent, 36 A. 0316 - Almoradí  
ALICANTE - ESPAÑA  
Tel: 00 34 626311881

www.espiritismo.cc  
xalvador@eresmas.com

## 10- USONO

United States Spiritist Council  
P.O BOX 14026  
20044-4026, WASHINGTON, D.C., USA  
Tel: 00 1 (240) 453.0361, Fax: 00 1 (240) 453.0362  
www.uspiritistcouncil.org  
vanderleim@iadb.org

## 11-FRANCIO

Union Spirite Française et Francophone  
1, Rue du Docteur Fournier  
37000 TOURS - FRANCE  
Tel/Fax: 00 33 (2) 4746-2790 -  
http://perso.wanadoo.fr/union.spirite  
union.spirite@wanadoo.fr

## 12-GVATEMALO

Cadena Heliosófica Guatemalteca  
14 Avenida 9-66, Zona 12.  
Ciudad de GUATEMALA, GUATEMALA. 01012.  
Tel. 00 (502) 440 1292 - 00 (502) - 471 8511  
www.guatespirita.org  
ebravo@terra.com.gt

## 13-NEDERLANDO

Consejo Espirita Holandes  
Klokketuin 15 1689 KN - HOORN - HOLLAND  
Tel: 00 31 (0)229 234527  
www.nrsp.nl  
info@nrsp.nl

## 14-ITALIO

Centro Italiano Studi Spiritici Allan Kardec  
Casella Postale 207, Aosta Centro, 11100 - Aosta - ITALIA  
www.spiritismoitalia.org  
Tel: 00 39 (0) 165 903487  
saser@libero.it

## 15-JAPANIO

Comunhão Espirita Cristã Francisco C. Xavier  
Codigo Postal 272-0143  
Flat Top Valley 101  
3-13-20 Ainokawa - Ichikawa-shi, CHIBA  
info@spiritism.jp  
www.spiritism.jp

## 16-MEKSIKO

Central Espirita Mexicana  
Retorno Armando Leal 14 - Apartado Postal No.  
117-060. CP. 07091 -  
CIUDAD DE MÉXICO - D. F. - MEXICO  
Tel: 00 52 5715-0660 - Fax: 00 52 5715-2545  
www.cenemex.org  
idominguezl@aol.com

## 17-NORVEGIO

Gruppen for Spiritistiske Studier Allan Kardec  
Majorstuveien 26 0367 OSLO - NORGE  
Tel. 00 47 (22) 444293  
www.geocities.com/athens/oracle/8299  
geeak@chello.no

## 18-PARAGVAJO

Centro de Filosofía Espiritista Paraguayo  
Calle Amánio Gonzáles, 265



## ASUNCIÓN - PARAGUAY

Tel/Fax: 00 595 21 90.0318  
www.spiritist.org/paraguay/  
e-mail: arami@rieder.net.py

## 19-PERUO

Federación Espirita del Perú - FEPERU  
Jr. Salaverry N° 632 - Dpto. 1A.  
Magdalena del Mar - LIMA 17 PERU  
Tel: 00 51 1 263 3201  
www.spiritist.org/peru/  
feperu27@hotmail.com

## 20-PORTUGALIO

Federação Espirita Portuguesa  
Casal de Cascais Lote 4 R/C -  
Alto da Damaia 2720 - Amadora  
LISBOA - PORTUGAL  
Tel: 00 351 21 497-5754  
http://www.feportuguesa.pt  
e-mail: feportuguesa@iol.pt

## 21- BRITIO

British Union of Spiritist Societies-BUSS  
25 Blyte House  
Kennington Park Road  
LONDON SE 11 5TX  
ENGLAND - UK  
www.spiritistunionuk.org.uk  
busslectures@aol.com

## 22-SVEDIO

Svenska Spiritistiska Förbundet  
c/o Olof Bergman  
Sottingeplan 44, 1tr - 16361  
STOCKHOLM - SUECIA  
Tel: 00 46 (8) 89-4105  
www.spiritism.se  
info@spiritism.se

## 23-SVISO

Union des Centres d'Études Spiritiques en Suisse  
Postfach: 8404  
WINTERTHUR - SUIÇA  
Tel.privé: ++ 41/055 210 1878  
www.spiritismus.ch  
uccess2001@yahoo.com

## 24-URUGVAJO

Federación Espirita Uruguaya  
Arenal Grande, 1415  
11100 - MONTEVIDEO - URUGUAY  
Tel: 00 598 62 24980  
centroespiritamaldonado@hotmail.com

Partoprenu en la Kampanjo  
por Disvastigo de Spiritismo:

\* Konatiĝu kun **SPIRITISMO**,

NOVA ERAO POR LA HOMARO

\* Disvastigu **SPIRITISMON**,

NOVA ERAO POR LA HOMARO

Kaptu en la ttt-ejo

[www.spiritist.org](http://www.spiritist.org)

la preseblajn tekstojn



# Jesuo kaj Kardec

**A**

ntaŭ la Dia Revelacio, Jesuo asertas:

— Mi ne venis detrui la Leŭon.

Kaj Allan Kardec emfazas:

— *Spiritismo simile diras: — Mi ne venis detrui la kristanan leŭon, sed ĝin plenumi.*

Æe la grandeco de la vivo, la Dia Majstro eldiras:

— *Æe la domo de mia Patro estas multe da loĝejoj.*

Kaj Allan Kardec klarigas:

— La domo de la Patro estas la Universo. La diversaj loĝejoj estas la mondoj, kiuj cirkulas en la senfina spaco kaj donas al la enkarniĝintaj Spiritoj loĝejojn respondajn al ilia grado da progreso.

Glorante la leŭon de amo, kiu regas æies destinojn, la Sinjoro admonas:

— Amu vin unu alian, kiel mi amis vin.

Kaj Allan Kardec proklamas:

— Ekster karitato estas nenia savo.

Reliefigante la neceson de progreso por akiro de scio kaj virto, la Kristo avertas:

— Ne metu la lampon sub la grenmezurilon.

Kaj Allan Kardec aldonas:

— Por esti fruktodona, la fido devas esti aktiva; ĝi ne devas rigidiĝi.

Atentigante pri la bezono de memklopodado, la Sinjoro admonas:

— Serĉu, kaj vi trovos.

Kaj Allan Kardec diras:

— Helpu vin mem, kaj la Æielo vin helpos.

Reliefigante la neceson de edukado, la Sublima Gvidanto diris:

— Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via Æiela Patro estas perfekta.

Kaj Allan Kardec aldonas:

— Oni rekonas la veran spiritiston laŭ ties morala transformiĝo, laŭ la klopodoj, kiujn li faras, por subigi siajn malbonajn inklinojn.

Laydante la servemon, la Eterna Amiko sciigas:

— Mia Patro ĝis nun laboras, kaj mi laboras.

Kaj Allan Kardec konfirmas:

— Se Dio kreus la homon libera je la korpa laboro, la membroj de la homo atrofiĝus; se libera je l' intelekta laboro, la homa spirito restus en sia infaneco, en stato de besta instinkto.

Elstarigante la prirespondecon, la Sinjoro atentigas:

— Oni postulos multon de tiu, kiu multon ricevis.

Kaj Allan Kardec konkludas:

— De la spiritistoj estos multo postulata, ĉar ili ricevas multon.

Glorante la filozofio de la evoluado per travivo de senombraj ekzistadoj, kiuj al ni perfektigas la estecon æe la necesaj sinsekvaj reenkarnejoj, la Sublima Instruanto klarigas:

— Neniu povos vidi la Regnon de Dio, se li ne naskiĝos denove.

Kaj Allan Kardec proklamas:


— Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi, tia estas la leŭo.

*Konfirmante la noblan mision de la vera scienco, la Majstro inter la majstroj atentigas:*

— Kaj vi scios la veron, kaj la vero vin liberigos.

*Kaj Allan Kardec eldiras:*

— Neskuebla fido estas nur tiu, kiu rekte rigardas la racion en æiuj aĝoj de la homaro.



*Mesaŭo psikografie skribita de la mediumo Francisco Cándido Xavier, dikta de la Spirito Emmanuel. Represo el la revuo Reformador de Aprilo 1957, kiam La Libro de la Spiritoj fariĝis centjara.*

*La Apostolo de la Spiritisma Kodigo montriĝas tiel forte identiĝinta kun la Dia Majstro, ke la respektindaj spiritaj kurieroj, kiuj kontrolis lian verkon, estis pozitivaj en æi tiu resuma esprimo, kiun ni æerpas en la Respondo al la Demando numero 627, en La Libro de la Spiritoj:*

— Ni estas komisiitaj, por prepari la Regnon de Bono, anoncitan de Jesuo.

*Jen kial ni, æe la unua centjaro de la fundamentaj paŝoj de la Spiritisma Kodigo, salutas Spiritismon — Flamon de la Viva Fido brilegantan sur la brulato de la Filozofio kaj de la Scienco — kiel la Restarigitan Kristanismon aŭ la Religion de Amo kaj Saŭo, kiu, fontante el la Sublima Spirito de Nia Sinjoro Jesuo-Kristo, trovis en Allan Kardec sian fidelan reflektilon por liberigo kaj altigo de la tuta homaro. ■*

Emmanuel



FARU VIA LA STANDARDON DE LA  
KODIGINTO DE SPIRITISMO.

EKSTER  
KARITATO  
NENIA  
SAVO



OMAGŖO AL ALLAN KARDEC EN LA DUCENTJARA NASKIĜREVENO.

LA INTERNACIA SPIRITISTA KONSILANTARO  
[www.spiritist.org](http://www.spiritist.org)

FARU VIA LA STANDARDON DE LA  
KODIGINTO DE SPIRITISMO.

LABORO  
SOLIDARECO  
TOLEREMO



OMAGŖO AL ALLAN KARDEC EN LA DUCENTJARA NASKIĜREVENO.

LA INTERNACIA SPIRITISTA KONSILANTARO  
[www.spiritist.org](http://www.spiritist.org)

Parizo - De la 2<sup>a</sup> ĝis la 5<sup>a</sup> de Oktobro 2004

# 4<sup>a</sup> Tutmonda Kongreso de Spiritismo

1804 - 2004

*Ducentjara Naskiĝtago  
de Allan Kardec*

**Iniciato:** Conseil Spiritiste International  
Secrétariat Général  
Tel/Fax: (55.61) 322-3024  
SGAN Quadra 603 Conj. F  
70830-030 - Brasilia - DF - Brasil  
E-mail: [spiritist@spiritist.org](mailto:spiritist@spiritist.org)

**Plenumo:** Association KARDEC  
Tel/Fax: (33.2) 4746-2790  
1 rue du Docteur Fournier  
Boite Postale 27 07  
37027 - Tours Cedex 1 - France  
E-mail: [Union.Spirite@wanadoo.fr](mailto:Union.Spirite@wanadoo.fr)  
<http://pero.wanadoo.fr/union.spirite>

[www.spiritist.org](http://www.spiritist.org)